# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Septembro 2017 n-ro: 21



***Merhaba,***

Eylül sayımızla gene birlikteyiz. Bu sayımızda normal sayfa sayımızı aştık 32 sayfaya ulaştık, ayrıca on adet orijinal olarak yazılıp dergimize gönderilmiş makale var. Bunlar ve diğerleri içinden belki size en ilginç gelecek yazılar aşağıda, ancak diğer yazılar da okunmaya değer :

- Ĝemo
- Deloso
- Oro-kolora pejzaĝo
- Fabelo pri Talpo
- EMESAL: Ĉu la plej antikva planlingvo
- Miaj fruaj tagoj en Esperanto-lando
- La sciencfikcia biblioteko de Istanbulo
- Norvega Nokto
- Antaŭ 600 milionoj da jaroj...
- Kial ni havas anserhaŭton?
- Esperanto en francaj lernejoj
- Pacdeklaro de Nagasako 2017


***İyi okumalar...***

***Saluton,***

Ni denove estas kune kun vi pere de nia septembra numero. En ĉi tiu numero ni atingis 32 paĝojn kaj estas dek originalaj verkoj senditaj al nia revueto. El tiuj kaj el la aliaj artikoloj jen eble la plej interesaj por vi, sed ankaŭ la aliaj meritas legadon:

- Ĝemo
- Deloso
- Oro-kolora pejzaĝo
- Fabelo pri Talpo
- EMESAL: Ĉu la plej antikva planlingvo
- Miaj fruaj tagoj en Esperanto-lando
- La sciencfikcia biblioteko de Istanbulo
- Norvega Nokto
- Antaŭ 600 milionoj da jaroj...
- Kial ni havas anserhaŭton?
- Esperanto en francaj lernejoj
- Pacdeklaro de Nagasako 2017

***Bonan legadon...***




**TURKA STELO**
Eldonanto : Turka esperantistaro
Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


| Ĉeflingvo: | Kodo: |
|---|---|
| Esperanto (+turka) | Li-TUR-06 |

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo


| | |
|---|---|
| Malfermo | 1 |
| Enhavtabelo | 2 |
| Kursoj | 2 |
| Esperanto-Sumoo | 3 |
| UEA | 3 |
| TEJO | 3 |
| Leterojn ni ricevis el geamikoj | 4 |
| Ĝemo | 4 |
| Letero al amiko | 5 |
| Deloso | 6 |
| Oro-kolora pejzaĝo | 7 |
| Fabelo pri Talpo | 9 |
| Raportoj pri la kunsidoj kiujn mi prezidis | 10 |
| EMESAL: Ĉu la plej antikva planlingvo | 11 |
| Miaj fruaj tagoj en Esperanto-lando | 13 |
| Kio ni estas kaj kion ni celas (8 -fina) | 14 |
| Dankon Amiko (8) | 15 |
| Finiĝis la 102-a UK - festparolado de M.Fettes | 16 |
| Finiĝis la 102-a UK - rezulucio de la Kongreso | 18 |
| El la libro de "Dao de Jing" (13) | 18 |
| Ŝercoj | 19 |
| Kurĉvort-enigmo | 20 |
| Mallonga Historio de Filozofio (20) | 20 |
| La sciencfikcia biblioteko de Istanbulo | 21 |
| Kredodeklaracio - poemo de R.Platteau | 21 |
| Senproteste - Poemo de L.Szász | 23 |
| Figuro - Poemo de M.N.Laroca | 23 |
| Varmego kaj aŭtado | 23 |
| Norvega Nokto | 24 |
| Antaŭ 600 milionoj da jaroj... | 24 |
| Kial ni avas anserhaŭton? | 25 |
| Esperanto en francaj lernejoj | 25 |
| Pacdeklaro de Nagasako 2017 | 26 |
| Enric Baltasar nova prezidanto de TEJO | 27 |
| Esperanto Kurso (20) | 28 |
| Ekfunkciis "Fuxing" | 30 |
| La stato de Esperanto en Hungario | 31 |
| Estas nokto. Pluvas. Tiktako... | 31 |
| VeganArto | 32 |


## Kursoj




1) La kurso en la Lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbulo daŭras.

2) La kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto ne okazas ĉijare.

3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

4) La du kursoj pri "Lingvoakirado" en la fako de "angla-instruisto" ĉe Erciyes universitato en Kayseri urbo, en kiuj ĉeestis sume 70 studentoj, finiĝis sukcese. La studentoj memlernis limigitan Esperanton dum kaj post la lernejaj horoj kaj ili uzis tiun sperton kiel eksperimento por malkovri kiel homoj lernas trian lingvon. Ĉu la bazo estas la denaksa lingvo, aŭ ĉu iu alia dua lingvo ili jam lernis? (en ĉi tiu kazo la angla).



Ni estis informita de la profesoro, ke la studentoj sukcese uzis la limigitan Esperanton kiun ili lernis, kaj en la fino de la lerneja jaro ili observis simplajn sed interesajn rezultojn. La instruisto pripensas konduki la saman eksperimenton ankaŭ venontjare.

Kiam rezulta informilo estos pretigita pri la eksperimento mi tradukos ĝin kaj anoncos en nia revueto.

Kompreneble la celo ne estis la lernado de Esperanto sed per tiu eksperimento almenaŭ 70 studentoj konatiĝis kun kio estas Esperanto kaj eĉ limigite ili lernis la lingvon.




## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



**Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!**

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, recenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: **vasilkadifeli@gmail.com**

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



Karaj sumoo-partoprenantoj,

Finiĝis la 8-taga, mallonga sumoo. En tiu ĉi sumoo rimarkindas jenaj aferoj:

1. La nombro de la partoprenantoj estis 333 el 31 landoj. La malkresko okazis pro tio, ke tajvanaj kaj svisaj gelernantoj ne partoprenis pro somera feriado.
2. Koreoj okupis la unuan lokon kun 102 partoprenantoj. Ĉiuj 102 homoj perfekte venkis 8 tagojn. Mirinda afero.
La dua: Japanio (66), la tria: Francio (34), la kvara: Brazilo (18), la kvina: Pollando (17), la sesa: Vjetnamio (14)
3. Nove partoprenis unu el Puerto Riko.
4. Ĉi-foje 4 novaj kunlaborantoj laboris. Mi multe dankas ilin.

Mi esperas, ke ĉiuj fartos bone por la septembra sumoo, kiu okazos ekde la 10-a de septembro dum 15 tagoj. Mi ricevis bedaŭrindan informon pri du luktistoj, kiuj ne aŭ malbone partoprenis en la sumoo pro malsaniĝo. Sano estas plej grava por la Esperanta vivo.

HORI Jasuo

--------
* El Turkujo partoprenis nur du legantoj kiuj ambaŭ finis la Sumoon sukcese per 8 venkoj. ĉiu. Estas la potenco partopreni almenaŭ per 5-6 kaj ka maksimue per 10-12 legantoj sed bedaŭrinde tio ne okazas.

Jen nia retejoj:
**http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html**
kaj
**https://www.facebook.com/groups/759066970888217/**

## UEA

N-ro 696 (2017-07-28)
**Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2017 BRANĈO POEZIO**
Unua premio al Nicolau Dols, Hispanio, pro "Pasio. Poemo en ses stacioj". **[…]**

N-ro 695 (2017-07-23)
**Du novaj membroj de la Honora Patrona Komitato**
La Honora Patrona Komitato de UEA ekhavis du novajn membrojn: Harald Helfgott kaj Giorgio Novello. **[…]**

N-ro 694 (2017-07-23)
**Nova honora membro de UEA: NGUYỄN Xuân Thu**
NGUYỄN Xuân Thu (nask. 1932-08-23). Profesie farmaciisto, esperantistiĝis en 1957. Estis ĝenerala sekretario de **[…]**

N-ro 693 (2017-07-19)
**Unesko-Kuriero en Esperanto eldoniĝis**
Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en **[…]**

N-ro 692 (2017-07-17)
**ESF lanĉas novan bultenon kaj revivigas alian**
ESF lanĉis novan anglalingvan retbazitan bultenon, kiu disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj **[…]**

N-ro 691 (2017-06-21)
**Finiĝis la 6-a Tutmonda Ekzameno kaj komenciĝos serio de unuopaj sesioj**
Ĉi-jare la unua kaj plej grava aranĝo de la Esperanto-ekzamenoj de UEA-ORIGÓ, organizitaj **[…]**

## TEJO

**La nova estraro de TEJO 2017-2018**
Ni ĝojas prezenti al vi la novan Estraron 2017 – 2018 de TEJO! La komitato de TEJO elektis la novan estraron dum la IJK – Internacia Junulara Kongreso en Aneho, Togolando. Gratulojn al ĉiuj kaj bonan laboron! Prezidanto: Enric Baltasar, el Hispanujo Vicprezidanto 1: Konstanze Schönfeld (Tuŝka), el Germanujo Vicprezidanto 2: Francesco Maurelli, el Germanujo Ĝenerala **[…]**

**Partoprenu la Junularan E-Semajnon en Pollando helpe de AEJK**
Ĉi-jare kiel vi verŝajne scias, la Junulara E-Semajno (JES) okazos de la 26-a de decembro 2017 ĝis la 2-a de januaro 2018 en Szczecin, Pollando: **http://jes.pej.pl/jes2017/** TEJO kunordigas kapablokonstruan partneradon subvenciita de Eŭropa Unio tra la programo Erasmus+ kiu nomiĝas AEJK (Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo). La partneraj landoj estas **[…]**

**Serĉata komisiito pri Landa Agado en Afriko**
Per monda rigardo al loka agado TEJO deziras subteni brilajn junajn aktivulojn, siajn landajn sekciojn kaj stimuli la junulara agadon, por kiu ni pensas ke ni povas signife kontribui. Tial ni havas mondkomisionon pri Landa Agado, kun laŭkontinentaj laborgrupoj kaj ties koncernaj komisiitoj. La agado dependas de la propraj iniciatoj kaj de komunaj agadoj, ĉefe **[…]**

## Leterojn ni ricevis el geamikoj

Mirinda revuo, mi tuj disdonos ĝin tra niaj samideanoj ĉi tie. Estis elektitaj belaj kaj bonkvalitaj skribaĵoj. Gratulojn. Mi ege ĝojas, ke jam estas en rilato kun civitanoj el Turkio kie loĝas tre multe da niaj sampatrujanoj ekde jarcentoj. Ankoraŭ dankon, Amike

**Bardhyl Selimi el Albanujo**

Elkore mi dankas kaj gratulas al vi pro la belega revuo Turka Stelo! Mi ĵus ricevis ĝin kaj ĝin elŝutis por legi trankvile sed mi jam ĝin foliumis, kaj ĝuis ĝian enhavon! Dankon pro via afabla publikigo de mia kronikaĵo. Mi tuj diskonigos la revuon al miaj geamikoj! Brakume,

**Maria Nazaré Laroca el Brazilo**

Karaj amikoj, ĉar mi ne povas kontentige moviĝi en la malfacila mondo de la interreto, mi ne konis la revuon "Turka Stelo". Tute hazarde, vagante en facebook mi renkontis ties numeron, kiu ege min impresis. Mi ĝuis la aspekton kaj la enhavon de via revuo (kiun tre malĝuste vi alnomas "revueto") kaj mi deziras gratuli vin pro tio. Kredu, kara, ke via revuo estas inter la plej bonaj, kiujn mi renkontis dum mia tre longa irado en la esperantista medio.

**Spiros Sarafian el Grekujo**

Kara gesamideano, Bonan tagon! Mi ege ĝojis ricevi, de mia brazila amikino Nazare Laroca, la aŭgustan numeron de Turka Stelo. Kaj mi ĵus legis ĝin! La revuo tre feliĉigis min, kaj estis vera plazuro legi ĝin. Mi volas gratuli vin kaj la tutan Turkan esperantistaron pro tiu bonega kaj belega laboro! Kaj mi deziras ĉion bonan al vi ĉiuj. Koran dankon pro tiu gravega laboro! Dio benu vin! Frate,

**Luis Morais el Brazilo**

## ĜEMO

**Fatma Eroğlan, el Turkujo**

"***Frenezo estas nenio pli ol sentiveco de emocioj***" diras Edgar Allan Poe.

Bedia Tuncer estis instruistino kaj respondeculino por trejni stabon de Bakırköy Mensa Malsanulejo en Istanbulo inter la jaroj 1961-1964. Kiam ŝi laboris tie, ŝi havis la ŝancon kontakti malsanulojn. Do, ŝi trovis la eblecon malkovri ilian internan mondon. Ŝi rimarkis, ke kelkaj havis kapablon por esprimi siajn emociojn skribe. Ŝi petis, ke ili skribu iliajn emociojn en formo de poemoj. Konante ilian vivon ŝi konstatis la veron, ke ili tute ne estas homoj forlasindaj al forgeso. Ŝi pensis, ke indas kolekti la poemojn, kaj poste ŝi eldonis libron el tiuj poemoj, titolita "Ĝemo", por montri ilian suferon. Jen kelkaj poemoj el tiu libro, kiun mi tradukis al Esperanto.



Bonvolu viziti nian kulturan paĝon ĉe: **https://esperantoturkiye.wordpress.com/2017/05/18/kultura-pago-indekso/**




### Al mia blonda karulino

*Viaj okuloj estas la ĉielo de via flava hararo*
*sed mi ne amas vin pro viaj okuloj.*
*Via orflava hararo estas kiel via rigardo*
*ombra, sed mi ankaŭ ne amas vin pro via hararo.*
*Se via maro odoranta lipo tuŝus mian lipon,*
*tiu frenezus min, sed mi ankaŭ ne amas vin pro viaj lipoj.*
*Ĉar vi estas mia korpo kaj mi via animo.*

### Ne forgesi

*Mi volis ne forgesi vin*
*Sed mi neniam sukcesis al tio*
*Tamen mi nun forgesis*
*vin, jen*
*Kial vi rememorigis vin*
*enirante en mia sonĝo Hieraŭ nokte*



### Lanterno de Diogeno

*Inter la homoj, iu homo*
*En plena taglumo inter la homoj lanternon tenante*
*Serĉante ion.*
*Inter la homoj, iu alia homo,*
*Lia nomo Aleksandro*
*Sin turnis al li scivoleme*
*Demanis, kion li serĉis.*
*La viro montris la homojn*
*- Mi serĉas homon li diris*
*Kompreneble la viro pravas*

# Letero al amiko *

Elena Popova, el Bulgarujo

Ni konatiĝis rete. Baldaŭ mi ricevis lian foton – simpatia, rideta, homo rigardis al mi. Ni komencis rakonti unu al la alia pri niaj regionoj. Mi ricevis mapon.

- Ĉu ĉe vi estas vulkanoj?
- Jes, ankaŭ tertremoj, cunamoj…

Mia timema koro komencis forte bati. Mi skribis nelogike:

- Ĉu vi iam pensis loĝi aliloke?
- Nur en mia regiono estas 5-6 vulkanoj…

Urboj inter vulkanoj… Homoj kaj la antikva dio Vulkano, kaŝita, dormanta aŭ…

Sekvis foto: -Tiu vulkano situas ĉe mia urbo…

Mi sentis, ke mia koro forte tremas kaj volas forkuri. Miloj da homoj loĝas tie, ĉe la dormanta vulkano. La infanoj lernas, ludas, revas…La vivo ĉiam daŭras…



(*La monto Asama en mia gubernio. Ĝi estas la plej aktiva vulkano en Japanio. En la foto vidiĝas fumo, sed fakte ĝi estas vaporo.*)



(*Dormanta vulkano Akagi en mia urbo.*)

Mi ne demandis pli, mi serĉis informojn. Strange – anstataŭ meti iun vulkanon kiel simbolo de sia regiono, la homoj elektis naturaĵojn. Jen:



- fiŝo – ayu, kiu vivas nur en puraj riveroj.
- arbo – pino.
- floro – japana rododendro aŭ azaleo.
- birdo – kupra fazano.

Mi komprenis la japanan saĝecon – ili elektas la vivon. Ili sendas epistolojn al siaj infanoj: "Amu kaj gardu la Naturon! Ni estas fortaj!..."

Mia reta amiko, kun la rideta vizaĝo, estas turisto. Nun li iris ĝui la belecon de la naturo kaj serĉi trankvilecon al la blankaj montaraj neĝoj.

Mi sendas lin bondezirojn per kelke da miaj hajkoj.

Antikva dio
sonĝe revas pri fajro.
Neĝo sur vulkan'

***

Ĉe la piedo
de l' vulkan'- verda arbar'.
Pinoj odoras.

***

Vulkanoj spiras –
japana panoramo.
Tim'por amiko.

***

Trankvila urbo
ĉe dormanta vulkano.
Floras azale'.

***

Amiko sonĝas
oran fiŝeton. Promes'.
Puraj riveroj.

* ***Dediĉita al s-ro Hori Jasuo el Japanio***

# DELOSO (ΔΗΛΟΣ)

Spiros Sarafian, el Grekujo

En la centro de la Egea Maro, inter Helenujo kaj Malgrandazio, sur la marvojoj kunligantaj la nordon kun la sudo kaj la okcidenton kun la oriento, estas senarba, granita insuleto, unu el la plej signifaj sanktaj lokoj de la tuta antikva mondo. Ĝia nomo estas Deloso.




*(Deloso en la mezo de Delfo kaj Sardeso)*


En la tre malproksima antikveco, kiam la granda, ĉiopova reĝo de ĉiuj dioj, Zeŭso (Ζευς), absolute regis super la tuta mondo, dioj kaj mortemuloj bone sciis, ke nur unu estaĵo, nur unu forto povis kontraŭstari al li, kaj tiu estis lia edzino, la majesta kaj fiera diino Hera (Ήρα), inter ĉio alia, precipa protektanto de la geedzeco.

Hera, same kiel ĉiuj edzinoj, antikvaj kaj nuntempaj, estis tre ĵaluza, sed tiun ŝian –ni diru normalan- virinan emon intensigis la fakto, ke la granda diestro estis ekstreme inama viro.

Li amis, respektis kaj honoris sian edzinon, tamen li ne povis cedi al sia pasio, al la tento sekskuniĝi kun ĉiu bela virino kiun li renkontis. Memvolaj aŭ senvolaj "viktimoj" de la dia volupto estis diinoj, nimfoj kaj aliaj inaj diaĵoj, ankaŭ ordinaraj mortemulinoj kaj frukto de la senbrida dia dezirego estis abundo da geidoj, dioj, duondioj, herooj k.c.

La ĉiopova dio, kompreneble, povis kaj ĉiam sukcesis trompi sian ĵaluzan edzinon, kiu ĉiam informiĝis pri ĉiu nova adulto tre malfrue, kiam la dia peko estis jam farita. Tial, objekto de la diina kolero kaj puno estis ordinare la allogantino de la dio.

Ekzakte tio okazis, kiam Zeŭso, kuniĝinte kun la belega titanidino Letoa (Λητώ), gravedigis ŝin. Hera, decidinte puni kiel eble plej severe la belulinon, kiu aŭdacis uzurpi ŝiajn edzinajn rajtojn, ordonis ĉiujn lokojn, ĉiujn urbojn, ĉiujn insulojn ne akcepti Letoan, ne permesi al ŝi ie ajn resti por akuŝi.



La malfeliĉa gravedulino longe vagadis de loko al loko, ĉiuj forpelis ŝin, neniu loko akceptis ŝin, kompreneble pro timo je la diina kolero kaj minacoj.

Kiam la malesperanta virino estis jam sentinta la unuajn akuŝdolorojn, atingis la malgrandan, humilan, tute sensignifan kaj preskaŭ dezertan insuleton, Deloson. Dezirante ekspluati sian lastan esperon, petis de la malriĉa insuleto ke ĝi akceptu ŝin, promesinte per varmaj ĵuroj ke la brila filo kiun ŝi naskos iĝos la plej glora, post sia patro, dio, kiu igos sian modestan, nerimarkindan naskiĝlokon fama, admirinda kaj honorinda en la tuta mondo.

Letoa promesis al Deloso ĉion dezirindan kaj la malriĉa insuleto, kiu povis nenion perdi, cedis, akceptis kaj permesis al la virino stari kaj akuŝi tie sian idon.

Tamen, Hera, indigninte pro tio, ke ŝi ne plu povis fari ion kontraŭ tiom malriĉa loko, decidis turmenti alimaniere Letoan, do, ŝi trompis sian filinon Eilitiian (Ειλείθυια), kies tasko estis protektadi, helpi kaj flegi la akuŝantajn virinojn, ŝi kovris ŝin per oraj nuboj kaj la dia akuŝistino, vidante kaj sciante nenion pri Letoa, ĝuadis senzorge la magian etoson de Olimpo.

La malfeliĉa Letoa suferis pro netolereblaj akuŝdoloroj naŭ tagojn, tamen sen interveno de Eilitiia ŝi ne povis akuŝi. Dume, ĉirkaŭ la gravedulino estis kolektiĝintaj multaj diinoj, kiuj tamen povis nenion fari por ŝin helpi. Tiam, la diino Irisa (Ίρις) sekvanto kaj heroldo de la olimpaj dioj, kompreninte ke ĉion kaŭzis ia nova intrigo de Hera, kaŝe flugis al Olimpo kaj sekrete donis al Eilitiia la sciigon pri la afero de Letoa.

Kiam Eilitiia atingis Deloson, tuj, mirakle, Letoa naskis siajn brilajn ĝemelajn bebojn, Apolonon (Απόλλων) kaj Artemisan (Άρτεμις).

Tiele venis en la mondon unu el la plej grandaj olimpaj dioj, tiu de la lumo, de la poezio kaj artoj!

Tuj kiam la dio naskiĝis kaj la nereidino Tetisa





(Θέτις) metis en lian buŝon la dian trinkaĵon kaj manĝaĵon, nektaron kaj ambrozion, li, mirakle, viriĝis kaj ĉio ekbrilis pro lia beleco kaj majesteco. La malriĉa insuleto, en nur unu momento, iĝis belega, briligita de mirakla lumo, kiu de la ĉielo kronis ĝin.

La granda dio, plenumante la promeson de sia patrino, fondis sur la insulo sian grandiozan sanktejon, kiun vizitis abundo da pilgrimantoj el la tuta Helenujo kaj la cetera, barbara mondo. Deloso iĝis la religia adorcentro de la antikva mondo, ĝi akiris la ĝeneralan respekton kaj admiron, kaj fiere staras, ĉirkaŭita de multaj belaj insuloj, kiuj, formante cirklon, ŝajnas kvazaŭ ili estas dancantoj, kiuj ronde dancas ĉirkaŭ la honorata insuleto. Kaj ĉar tiuj ceteraj insuloj formas cirklon (ciklon – κύκλος) ili estis nomitaj Cikladoj (Κυκλάδες).

Tio estas unu ankoraŭ bela, helena mito, tamen la realo pruvas, ke, vere, la malgranda, granita insuleto de la Egea Maro, estis dum multaj jarcentoj en la centro de la antikva, tutmonda intereso, kiel unu el la plej signifaj religiaj adorlokoj de la tuta tiama mondo. Daŭraj prifosoj en la du lastaj jarcentoj elkovris multon da sanktejoj, temploj, abundon da unikaj artaĵoj.

La dezerta insuleto, brilanta, ĉiam banata de ia, neordinare hela, vere apolona sunlumo, staras ĝis nun, fiera, eterne honorata belulino, en la centro de rondo el allogaj insuloj kaj neniam ĉesas veki la mitajn kaj historiajn rememorojn de la tiom malproksimaj kaj samtempe tiom proksimaj tempoj.

Tiamaniere, ĝi malavare regalas siajn sennombrajn vizitantojn, kaj, mi, kiu, strange, restas fidela al la mitoj, certigas, ke en tiu loko, mi sentas ian nepriskribeblan gajecon, ian neordinaran vivecon. Ŝajnas al mi ke en Deloso la suno, vere, havas alian, pli helan sed pli mildan brilon; mi turnas la vizaĝon al la ĉielo, mi fermas la okulojn kaj mi sentas kaj ĝuas ian misteran, revigligan kareson. Ŝajnas, ke Apolono neniam forlasis sian amatan naskiĝlokon!

**Vortareto**

| | |
|---|---|
| Malgrandazio | La larĝa duoninsulo inter la Maroj Nigra, Egea k Mediteraneo. Anatolio. |
| Deloso | Insulo en la Egea Maro (Reneia, 25°16'E, 37°23'N); naskiĝejo de Apolono k Artemiso. (PIV) |
| titanidino | idino de Titanoj |
| Titano | Iu ajn el la filoj de Urano kaj Gaja, gigantoj, kiuj provis ribele invadi Olimpon, metante Osson sur Pelionon, kaj estis fulmobatitaj de Zeŭso (PIV) |
| Eilitiian | Filino de Hera kaj Zeŭso, diino de nask-doloroj kaj la idaroj, kies tasko estis helpi la naskontan virinon |
| nereidino | La 50 filinoj de Nereo (Helena mardio), personigo de la ludantaj ondoj. (PIV) |
| Tetiso | Diino, filino de Nereo kaj patrino de Aĥilo. (PIV) |
| Apolono | Helena k Romana dio de la lumo, poezio k artoj )PIV) |

## Oro-kolora pejzaĝo


tradukis: Takashi Ito, el Japanio



*-- de Osamu DAZAI --*

*"Brila kaj verda kverko sur la strando, bela oro-kolora ĉeno ligita ĉirkaŭ la arbo"*

– Puŝkino –



Mi ne estis persono kiu bone kondutis dum mia knabeco. Tial ĉar mi turmentis la servistinon. Mi tre malamis maldiligentecon, do mi turmentis aparte pigran servistinon. Okei estis tia servistino. Se oni igis ŝin pritranĉi pomon, dum tia agado ŝi kelkfoje paŭzis. Se oni donus konsilon al ŝi, longatempe ŝi daŭrigus paŭzon rigardante tien kaj ĉi tien, kun la pomo en unu mano kaj la tranĉileto en alia mano. Ŝajnis ke ŝi havus malsupran povon pri kompreno. Mi nemalofte trovis ke ŝi staradis sen fari ion en la kuirejo. Malgraŭ ke mi ne estis matura homo, mi severe insultis, "He, Okei! la tago ne estas longa!", kvazaŭ mi estis pli maljuna, ĉar mi estis malkontenta kontraŭ ŝia konduto. Nuntempe, kiam mi rememoras tion, mi eksentas ke la tuta korpo tremegas pro la vortoj kiuj mi kutimis uzadi al ŝi, kiel se mi havas frostosenton.

Krome, iutage mi vokis ŝin kaj transdonis mian bildlibron kiu estis plena de multe da presitaj bildoj, kiuj estis paradantaj soldatoj : surĉevaliĝantaj soldatoj, soldatoj kiuj portas standardon per la mano aŭ kiuj havas fusilon sur la dorsoj, k.t.p. Mi igis ŝin eltranĉi la bildojn per tondilo. Okei, malsaĝa servistino, apenaŭ povis eltranĉi tridek presaĵojn de tagiĝo ĝis vespero sen tagmanĝo. Tiam ŝi fortranĉis duonon de la lipharoj de la generalo, kaj detranĉis la manon de la soldato havanta fusilon. La formo de la mano estis ŝajne piedo de urso. Mi riproĉis al ŝi la kulpojn.

Estis somero. Ŝi do ŝvitis sur la tuta korpo. La presaĵo de la soldatoj, kiujn ŝi eltranĉis, malsekaĝis

per ŝvito de la manoj. Tuj kiam mi vidis tion, mi eksplodis de kolero kaj piedbatis ŝin senkonscie. Tiam ŝi laŭte ekploris tenante dekstra vanton per sia mano, kvankam mi kredis ke mi efektive piedbatis ŝin sur la dorso, kaj plorante ŝi diris, "Eĉ mia gepatroj neniam piedbatis min sur la vizaĝo ĝin nun. Mi memoros tion por eterne."  Ŝia parolo estis plena de ĝemo. Tio certe donis tre malbonan senton al mi.

Ankaŭ poste mi ofte turmentis ŝin kvazaŭ ŝia fatalo. Tia karaktero de mi estas iom sama eĉ nuntempe. Mi ne povas elteni tian stultaĵon.

Lastjare, mi estis ekskludata kaj estis elpelata de mia familio. Ĉi-momente mi falis en mizeran situacion. Vagante de pordo al pordo kun la larmoj kaj petante iun helpon, mi pasigis tempon vane ĉiutage. Mi apenaŭ povis akiri perspektivon ke mi perlabolos vivremegojn per mia skribado.

Sed tamen tiam mi malsaniĝis! Dank' al kelkaj amikoj, dum la somero mi povis lui dometon, kiu staris proksime de la ŝlima maro apud la urbeto Funabashi, en la gubernio Ĉiba. Mi apenaŭ vivatenis min kun memkuirado.

Ĉiunokte mi suferis de ŝvito kiu malsekigis mian noktoveston, sed mi devis labori. Ĉiumatene kutime trinkis nur botelo de malvarma lakto. Nur la lakto ja donis al mi senton de mia feliĉo por vivo. Mi suferis pro kapdoloro kaj mia spirito tre ellaciĝis; eĉ se mi vidis florantan oleandron en la angulo de la ĝardeno, mi ne povis senti la belecon; ĝi estis nur flagrado por mi.

Tiutempe policisto patrolis kaj venis al mia dometo por kontroli la registron de la loĝantoj. Li estis magra kaj malaltastatura, ĉirkaŭ 40 jarojn aĝa. Komparante mian nomon en la matrikulo detale e plurfoje kun stoplobarba vizaĝo de mi, li diris, «Ho, ĉu vi ne estas la sinjorido de ...?» Lia parolo havis provincan akcenton de mia naskloko, mi do respondis arogante, «Jes! Nu, kiu vi estas?»

La policisto, plena de rideto en sia magra buŝo, respondis al mi, «Ho! certe! Probable vi forgesis min, sed mi estis kaleŝisto en "K", antaŭ ĉirkaŭ dudek jaroj.» "K" estis la nomo de mia naskoloko.

«Kiel vi scias, mi falis en mizeron.», mi respondis al li sen rideto.

«Negrave!», diris la policisto kun agrabla rideto. «Se vi skribas romanojn aŭ nobelojn, nur tio ja estas sukceso en via vivo, ĉu ne?»

Mi maldolĉe ridis.

«Nu, Okei multfoje parolas pri vi.» Li diris mallaŭte.

«Okei?», mi ne rekonis tion.,

«Okei, hola, ŝia nomo! Vi eble forgesas ŝin. Ŝi estis servistino de via hejmo---»

Mi rememoris ŝin. Ho ve! Mi senkonscie ĝemis. Klinante la kapon kaj kaŭrante en la enirejo, mi klare rememoris ke antaŭ dudek jaroj mi donis malbonan konduton al la stulta servistino, tio estas humiliga situacio por mi.

«Ĉu ŝi estas feliĉa?»

Subite levante mia kapon, mi faris la senhontan demandon. Tiutempa vizaĵo de mi certe estis vizaĵo de krimulo kun malfiera rideto ĉe la lipoj, laŭ mia memoro.

«Jes, apenaŭ feliĉe.» la policisto agrable respondis, forviŝante ŝviton de sia frunto per naztuko, kaj diris, «Se mi ne ĝenas vin, alifoje mi volas akompani mian edzinon pro esprimi nian dankon.»

Tio surprizis min. «Ne! ne!» Mi rifuzis ĝin. Tiam la sento de humileco, kiu estas neesprimebla, atakis min kaj mia korpo tremis pro la sufero.

Sed tamen la policisto estis gaja.

«Mi havas gefilojn. La unua filo feliĉe eklaboras en la stacidomo. Krom la filo, mi havas alian filon kaj du filinon. La plej juna filino aĝas ok jarojn kaj ekvizitas lernejon ĉi-jare. Jen ni jam povas esti trankvilaj almenaŭ kelkatempe. Ankoraŭ mia edzino penis. Mi ne scias, kiel diri... Ŝi estas iom elstara, ĉar ŝi lernis mastrumadon ĉe altklasa familio kiel la via... »

Li iom ruĝiĝis sian vizaĵon kaj ridis.

«Okei plurfoje diris pri via famo. En sekvanta ferio, mi certe akompanos mian edzinon por esprimi dankon al vi. »

Subite lia vizaĝo fariĝis serioza kaj diris, «Estu atenta pri via sano. Do, ĝis revido! »

Tri tagoj pasis; Maltrankvilo pri mona afero ne pri laboro okupis min. Mi ne povis resti trankvila pro zorgoj en la dometo la tutan tagon. Mi do decidis eliri al la strando. Mi tenis bambuo-bastonon en mia mano. Kiam mi malfermis la pordon, tri homoj staris tie kvazaŭ bela bildo; gepatroj kiuj portis somerajn kimonojn kaj knabino en ruĝa vesto. Ili estis la familio de Okei. Mi kriis laŭte; per tia kolera voĉo ke mi neniam eliĝis ĝis nun.

«Ĉu vi jam venis? Ve! Hodiaŭ mi devas ekiri por afero. Bedaŭrinde, bonvole venu alian tagon.»

La knabino, ok jaroj aĝa, similis al Okei kiu iam estis servistino. La filino vidis min per stulta kaj reva rigardo.

Mi estis malĝoja kaj tuj forkuris al la strando, antaŭ ol Okei parolos. Farĉante herbaĉojn per bambuo-bastono, mi transiris la bordo de la maro. Sen returni min, paŝon post paŝo, mi piediradis kvazaŭ mi stamfus, rekte al bazaro.

Kion mi faris en la bazaro? Vane rigardante kaj afiŝon de kinejo kaj montrofenestron de butiko. «Fi!», mi klakis per lango. «Vi mem perdis, perdis... » murmuro de mia koro aŭdiĝis. Ve! Ne povas esti tiel. Post kiam mi skuis la tutan korpon, mi ankoraŭ

ekpiediris. Povas esti ke ĉirkaŭ tri dek horoj pasis. Denove mi ekpiediris por reiri hejmen.

Kiam mi atingis la strandon, mi haltis dum kelka tempo. Jen paca pejzaĝo antaŭe! Okei, ŝia edzo kaj ilia filino ĝojis kaj ridis, ĵetante ŝtonetojn al la maron. Ilia voĉo aŭdiĝis ĉe loko kie mi staris.

«Sendube,» la policisto diris post energie ĵeti la ŝtoneton, «li estas tre intergenta, ĉu ne? Li faliĝos granda persono post ne longe.»

«Kompreneble, kompreneble», ŝia voĉo fiera kaj ĝoja, «la sinjorido diferencis de aliaj homoj ekde la knaba tempo. Li ĉiam traktis eĉ malsuprajn homojn kun komplezo kaj bonvolo.»

Mi ploris ĉitie en strato. La sento de intensa ekscito tute malaperis pro mia larmo, kiu igis min agrabla.

Mi tute perdis. Tio estas bona. Mi do devis akcepti tion. Lia venko donos lumon ankaŭ al mia morgaŭo.

----


**Osamu DAZAI** (1909–1948) estas unu de la ĉefaj rakontistoj en Japanio en la 20-a jarcento.
Fonto: **http://verbum303.blogspot.com.tr/2017/07/oro-kolora-pejzago.html**

## Fabelo pri Talpo

tradukis kaj sendis: Petro Palyvoda, el Ukrainio

Iam vivis Talpo. Li laboregis peze, tiel peze, ke li eĉ ne havis tempon por ripozi. Li fosadis tunelojn subtere, ĉesis nek tage nek nokte, skrappenetris per siaj piedoj tra malmola tero tiom forte, ke sango eliĝis el ili, tiom forte, ke li foje tute eluzis la ungojn, sed li fosadis kaj fosadis. La Talpo movis sin antaŭen rapide, sed li volis ankoraŭ pli rapide, la tero premis lin de ĉiuj flankoj, rezistante al la korpo de la Talpo, forskrapadis lian silkecan felon, sed la Talpo ne atentis tion, lia felo mudis, sed poste nova kreskis. La Talpo daŭrigis la fosadon. Pli kaj pli da tuneloj kuŝis malantaŭ la Talpo, sed estis la sama netrairebla muro antaŭ li, kaj la Talpo estis trabatanta tiun muron, denove kaj denove estis trabatanta, por ke liaj tuneloj plimultiĝu, por ke ili iĝu pli longaj. La okuloj de la Talpo konis neniun alian koloron krom la koloro de mallumo, la naztruoj de la Talpo konis neniun alian odoron krom la odoro de humida grundo. La Talpo laboregis pene, ho tiel pene, ĉar li sciis, ke baldaŭ liaj infanoj naskiĝos en la mondon. Kaj kiam liaj tri filoj naskiĝis, la Talpo ĵetis sin en la pezan laboron ankoraŭ pli intense, ĉar li havis jam iujn, por kiuj li vivu, iujn, kiujn li prizorgu. La Talpo forgesis eĉ kiel retrovi spiron, li fosis kiel spiris, ĉiutage, ĉiuminute. Kaj la Talpo faris siajn tunelojn ĉiam pli kaj pli larĝaj, por ke liaj filoj neniam devu forskrapadi siajn felojn, kiel li estis farinta iam, por ke la tero ne premu ilin tiom senkompate en sia sino, kiel lin iam, li volis almenaŭ, ke ili, se al li ne estis destinite, sentu, kio estas spaco, kio estas libereco. Kaj jam la filoj kreskis, kaj ankaŭ ili eklaboris, kaj ili sekvis sian patron kaj helpis lin.

– Filoj miaj, infanoj miaj, – la maljuna Talpo diris, – mi laboris la tutan mian vivon pene, por ke vi vivu pli facile, rigardu malantaŭen, jen estas centoj, miloj da kilometroj da larĝaj, vastaj tuneloj, kiuj serpentumas, iru kaj loĝu tie, kaj daŭrigu nian genton.



– Ho ne, patro, – la infanoj kontraŭdiris, – ni ne volas viajn tunelojn, ankaŭ ni volas senti nin posedantoj, ni volas fosi niajn proprajn tunelojn, nelonge restas por ni vivi solaj baldaŭ ankaŭ ni havos niajn proprajn familiojn, baldaŭ ankaŭ niaj infanoj naskiĝos en la mondon.

– Nu bone, – suspiris la Talpo, laca kaj elturmentita pro la laboro, sed kion li povis fari, – tiam almenaŭ per mia konsilo mi estos utila por vi, se vi ne volas miajn tunelojn.

Do la maljuna Talpo komencis doni konsilojn al siaj filoj kiel fosi pli rapide kaj en kiu direkto. Sed li mem ne evitas la laboron, skrappenetras per la dentoj en la teron tutforte por tamen ankoraŭ helpi siajn filojn. La tero premas lin, ne lasas lin spiri kaj ŝtopas liajn naztruojn. Mi laboradis dum mia tuta vivo kiel sklavo, fosadis pli kaj pli larĝajn tunelojn, ĉar mi strebis al vasto, sed nun mi mortos sufokita de la grundo, – pensis la Talpo kaj subiĝis al la sorto, lia korpo moliĝis, akceptante humile la tutan pezon de la ĉirkaŭa tero sur sin. Sed estas amare morti tute sola, li volis almenaŭ vidi la infanojn antaŭ sia morto, la Talpo ekvigliĝis, streĉante ĉiujn siajn muskolojn, ekfosis furioze, ne domaĝante sian korpon, en la nigran teron. La lastaj restaĵoj de la fortoj forlasis la Talpon, sed la laboro bolis, li fosis tiel rapide, kiel neniam pli frue, kiel eĉ en sia juneco li ne fosis, sed forgesis la Talpo en sia ardo la vojon, laŭ kiu li ĉiam moviĝis, kaj ekfosis iom pli alten. Kaj la Talpo faris la finan spurton kaj trabatis sin al la tersurfaco. La bonodora freŝa aero frapis liajn naztruojn, kaj tiel forte, ke li eĉ eksentis kapturniĝon. Kaj la Talpo ekvidis finfine la surfacajn kolorojn, kies ekziston li eĉ neniam suspektis antaŭe, la Talpo rigardis la ĉielon, kaj larmoj fluis malsupren de liaj okuloj, ĉar lia menso apenaŭ povis kompreni la belecon de la ĉielo. Sed pleje la Talpo estis impresita

de la spaco, la senfina, eterna spaco, al kiu li estis strebanta sian tutan vivon, por kies plivastigo li fordonis sian vivon. Ĉar li estis certa, ke la spaco ne estas donata tiel simple, kaj ke por havi ĝin oni devas toleri dolorigan turmenton. Sed evidentiĝas, jen kie estas la spaco, evidentiĝas, ke li eĉ ne sciis, kio ĝi estas. Li tretis la sinon de la tero, boris ĝiajn internaĵojn dum sia tuta vivo, ne konante ripozon, sed ĝis la libereco restis nur kelkaj centimetroj. Sufiĉis levi sian kapon kaj fosi iom pli alten. Mi estas ĉi tie finfine, nun mi povas vivi kaj ĝui mian vivon. La Talpo rememoris siajn filojn, volis reveni al ili kaj rakonti ĉion. La Talpo venkis, li batalakiris finfine de sia vivo tion, kion li ĉiam volis, la Talpo ne kapitulacis plene, sed jam delonge kapitulacis la korpo de la Talpo. Li provis movi sin, sed lia korpo ne obeis. Li povis nur klini sian kapon malsupren kaj krii al la tera firmaĵo:

– Filoj miaj, venu ĉi tien, sekvu mian voĉon!

Sed la filoj ne respondis kaj ne venis.

– Infanoj miaj, venu al mi, la tuta beleco de la mondo atendas vin – la Talpo ekkriis duafoje, ne rimarkinte, ke lia voĉo iĝis ankoraŭ pli mallaŭta kaj pli malforta.

Sed la filoj ankaŭ tiam ne venis, ĉar ili ne aŭdis sian patron.

– Filoj miaj, infanoj miaj, mi scias, ke vi ne plu aŭdos min, mi volas nur ke vi ĝis la fino iru laŭ mia lasta tunelo – la maljuna Talpo flustris kaj mortis, kvazaŭ li neniam vivis.

Liaj filoj laboris dume. Sed post iu tempo ili subite rememoris:

– Sed kien nia patro malaperis? – ili demandis unu la alian.

Ili sidis kaj malĝojis ioman tempon, ekploris silente, sed ne serĉis lin, ĉar ili sciis, ke li jam ne estas en ĉi mondo. Kaj ili ekstaris, ĉar ili devis komenci labori, ili ne havis tempon por mediti pri vivo kaj morto, tia estas la talpa vivo: batali por spaco kontraŭ la tero ĉiutage.



**Ukraina fabelo de Ĥristina Kozlovska**

## Raportoj pri la kunsidoj, kiujn mi prezidis

**raportis Hori Jasuo, el Japanujo**

Dum la 102-a UK en Koreio mi prezidis jene la kunsidojn:

1. Kleriga Lundo "**Praktikaj aferoj pri japana kulturo**"

40 homoj partoprenis. Enhavo: 1. Japana saniga tarapio, 2. fingro-teatreto (de s-ino Ŝoojama), 3. fingro-ludo, 4. Paper-teatro "Postulema edzino", 5. Paperfaldado (Origami) Ili faris pafilon kaj trompan ŝipon.




2. Kleriga Lundo "**Koncerto per nekutimaj muzikiloj**"

40 homoj partoprenis. Enhavo: 1. Deklamado de rekviemaj hajkoj pri la Japana Katastrofo okazinte en 2011, 2. Koncerto per nekutimaj muzikiloj (Naz-flutoj, buŝharpoj, ktp. entute per 20 muzikiloj)



3. **Kunsido Esperanto-sumoo**

30 homoj partoprenis. Ili ricevis la ĵus aperintan libron "Urboj de sumoo-istoj tra la mondo" kaj insignon de sumoo. Ili interŝanĝis opiniojn pri utileco de tiu Sumoo por la Esperanto-movado. Pradip el Nepalo montris ĵus faritan T-ĉemizon por sumoo kaj petis, ke ili aĉetu ĝin en Libroservo.

4. Kunsido de "**Parkera kantado de La Himno La Espero**"

La enhavo estis: 1. klarigo pri graveco de La himno kaj graveco de ĝia parkera kantado, 2. Kelkfoja kantado de la himno por memori ĝin, 3. Bingo rilaranta al la himno, 4. Ekzameno. (En la ekzameno 3 homoj el Brazilo, Nepalo kaj Kanado sukcesis parkere kanti la himnon kaj ricevis diplomon)
5. Krome dum Movada Foiro mi prizorgis pri **Go-ludo**, **eldonejo Horizonto** kaj **Esperanto-sumoo**, kaj dum Tago de libroj mi prezentis 5 librojn eldonitajn de mi

dum la pasinta unu jaro.

6. Dum SAT-kongreso mi prezidis:

a. Fukuŝima kaj poste (unue deklamado de la rekviemaj hajkoj same kiel en la UK, kaj poste mi montris 200 fotojn, kiujn mi fotis ekde la akcidento ĝis tiu ĉi julio. Homoj havis grandan intereson kaj komprenis la situacion de la nuklea akcidento en Fukus^ima)

b. "Koncerto per nekutimaj muzikiloj" same kiel dum la UK.

## EMESAL : ĉu la plej antikva planlingvo?

**MEZOPOTAMIO**




Artefaritaj lingvoj estas multenombraj. La lingvo internacia Esperanto estis ĝis nun laŭdire la plej uzata kaj sukcesa. Ĝenerale la plej konataj estas ĉefe tiuj, kiuj venas de la eŭropaj kulturoj: ĝuste ĉi tio estas la temo de la libro "La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea" (La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo), verkita de la italo Umberto Eco. Sed ekzistas iu lingvo, kiu ŝajne estis mem artefarita kaj kiu, se tio estus fine konfirmita, estus difinita la plej malnova inter ĉiuj planlingvoj. Ĝia nomo? **Emesal**.





Temas pri dialekto inventita en la lando Sumero, en la nuna suda Irako, verŝajne en la tria jarmilo antaŭ nia erao. En ĉi tiu artikolo oni proponos, unue, resumon pri la sumeranoj kaj ilia lingvo kaj, due, prezenton pri la sumera dialekto Emesal.

**La sumeranoj**

La sumera historio kaj la homara ekas samtempe, ĉe la apero de la skribo, elpensita en Sumero ĉirkaŭ 3400 jarojn a.K. Antaŭ tiu tempo oni parolas ne pri historio, sed pri prahistorio. Tiu skriba sistemo, kiu estas tre kompleksa, iĝis (proksimume en 2800 a.K.) la kojnoforma skribo, kiun oni skribis sur argilaj tabeloj kaj kiun uzis ĝis la fino de la unua jarcento de nia erao la sumeranoj, la akadanoj, la asiranoj kaj la babilonanoj.

La sumera civilizacio kreskis kaj disvolviĝis dum la unua parto de la tria jarmilo a.K. Tiam estris reĝoj de urbŝtatoj, sendependaj unu de alia, ekzemple Uruk, Ur, Ŝuruppak, Lagaŝ ktp, ĝis proksimume 2400 a.K. Tiam semidaj popoloj, kiujn estris Sargono de Akado, kaptis la potencon, unuigis la tutan sumeran landon, invadis la najbarajn landojn ĝis Mediteraneo kaj kreis la novan ĉefurbon de la unua reala imperio, Akadon. Tial oni nomas tiun periodon "akada". La akada lingvo apartenas al la familio de la semidaj lingvoj, samkiel la hebrea, la aramea, la araba ktp. Poste tiu akada lingvo evoluis al la babilona kaj al la asiria.




Post la falo de la akada imperio okazis ekde la 2100aj jaroj a.K. la "sumera renaskiĝo". Tiam estris grandaj reĝoj, ekzemple Gudea (la dua dinastio de Lagaŝ) aŭ Ur-Nammu (la tria dinastio de Ur, la konstruinto de la zigurato de Ur). Pri tiu periodo, oni malkovris multajn tekstojn: arĥivojn, reĝajn skribaĵojn (interalie destinitajn al la fundamentoj de monumentoj), beletraĵojn ktp.

Dum la 19a jarcento a.K. la sumeranoj iom post iom malaperis. Semidaj reĝoj estris la regionon. Inter ili estis la reĝo de Babilono Hamurabo (1792-1751 a.K.). La sumera lingvo ne plu estis vivanta, ne plu estis ies gepatra lingvo. Oni tamen ĝin konservis kiel klasikan

lingvon, kiel lingvon de skribistoj, de kleruloj kaj, eĉ pli rimarkinde, kiel lingvon ritaran. Tiu 18-a jarcento estis la granda epoko de la aranĝo kaj de la finfina eldono de la literaturaj sumerlingvaj tekstoj. Oni fine diru, ke, verŝajne, la sumera lingvo jam estis tre malnova tiam, kiam oni ĝin ekskribis en 3400 a.K. La sumera estas do prahistoria lingvo, kies parolantoj ĝin trenis al la historio, elpensante la skribon. Kiel klasikan lingvon, oni ĝin uzadis en Mezopotamio ĝis la fino de la unua jarcento p.K. La sumera do estis legata kaj komprenata dum almenaŭ tri jarmiloj kaj duono.

**La sumera lingvo**

La sumera lingvo, kiel multaj aziaj lingvoj (sed ankaŭ interalie Esperanto), havas aglutinan strukturon: oni ligas al iu neŝanĝebla radiko (substantivo aŭ verbo) aliajn elementojn semantikajn aŭ gramatikajn. Estas rimarkinda ankaŭ la fakto, ke multaj elementoj aŭ radikoj estas unusilabaj. Plie, la sumera lingvo ne estas akuzativema (kiel Esperanto, kiu indikas la objekton per akuzativo), sed ergativema (kiel la eŭska; ĝi substrekas la ergativon, do la subjekton agantan). Ekzemple, en la frazo "la homo konstruas la domon" en Esperanto oni montras la akuzativon per la finaĵo -n, dum la sumera montrus la ergativon, tio estas, laŭ la sama ekzemplo, "la homo". Ni diru nenion alian pri la sumera lingvo, kiu, samkiel ajna "natura" lingvo, estas tre malsimpla, havas kompleksajn gramatikon kaj skribsistemon ktp. Oni nur diru, fine, ke la sumera apartenas al neniu pli vasta lingva familio. Ĝi estas unu el la malmultaj lingvoj "sen familio", do tute izolitaj.

**Historio de la lingvo Emesal**

Emesal estas sumera dialekto, plej verŝajne artefarita. Cirkulas almenaŭ tri ĉefaj diversaj hipotezoj pri ĝia deveno:

1) ĝi povas esti idiomo havanta lokajn propraĵojn: Emesal estus do "natura" lingvo, sed oni ne bone komprenas, se tio verus, kial oni ĝin elektis kiel "klasikan" lingvon (legu sube);

2) ĝi povas esti lingvo de virinoj kaj de virin-emaj uloj. Ekzemple, oni legas iujn versojn emesal-lingvajn en kelkaj beletraĵoj, aparte tie, kie parolas virinoj (diinoj aŭ pastrinoj);

3) ĝi povas esti literatura aŭ poezia dialekto, aranĝita konforme al la recitativoj de sanktaj himnoj.

Aldone oni opinias, ke Emesal estas plej verŝajne artefarita lingvo, ĉe la lumo de internaj karakterizoj, pro kies teknikeco mi nun nenion diros prie. Fakte, Emesal montras neniujn kvalitojn de iu "natura" dialekto rilate al la sumera, kaj aludoj el antikvaj tekstoj ebligas al ni pensi, ke Emesal vere estas artefarita lingvo. Eble ĝin uzis virinoj, verŝajne pastrinoj, dum la unuaj tempoj kaj poste ĝin uzis (legu sube) la religiaj kantistoj.

Oni ne scias precize, kiam Emesal aperis. Fakte, oni konas neniun tekston emesal-lingvan skribitan dum la tria jarmilo a.K., do dum la epoko, en kiu la sumera estis vivanta lingvo. La plej malnovaj tekstoj emesal-lingvaj estis skribitaj dum la frubabilona periodo (ĉirkaŭ la 18-a jarcento a.K.). Temas ĉefe pri preĝoj, religiaj kantoj, beletraj lamentoj.

Oni ankaŭ ofte renkontas Emesalon legante tekstojn de la unua jarmilo a.K. (la periodo de la grandaj mezorientaj imperioj, nome laŭ tempa ordo: la asira, la babilona, la persa-aĥemenida kaj la helena-seleŭkida). Dum tiu epoko estis kvin grandaj klerulaj profesioj:

1) la skribarto ( ţupšarūtu, laŭ la babilona lingvo);

2) la astrarto, alivorte la profesio de astrologoj kaj astronomoj;

3) la medicino ( asûtu);

4) la "ekzorcarto" ( āšipūtu), do, fakte, la profesio de la ritaristo;

5) la religia kantarto ( kalûtu), nome la profesio de la Kalû (religia kantisto).

Tiuj kantistoj konis – probable parkere – la multenombregajn kompleksajn tekstojn, kiuj enhavis specialajn kantojn kantendajn al ge-diaĵoj en iliaj temploj aŭ en iuj sakralaj lokoj. Komence de la unua jarmilo a.K. la sumera lingvo estis mortinta jam de mil jaroj. Depost tiu epoko la sumera estis klasika kaj religia lingvo. Tiuj sanktaj kantoj estis kaj sumerlingvaj kaj emesal-lingvaj. Emesal do estis klasika lingvo, aparte religia, kaj iom laŭdire "sekreta". Emesalon do parolis praktike nur unu el la plej gravaj profesiuloj en la socio de Asirio kaj Babilonio.

**Lingvaj aspektoj de Emesal**

La lingvo mem ŝajnas pli-malpli sama kiel la sumera. La malsamoj estas nur sonaj kaj vortaj. La gramatiko nepre estas la sama en la sumera kaj en Emesal. Iuj ŝanĝoj estas kutimaj: [g] sumerlingva iĝas [b] en Emesal; [g] iĝas fojfoje siavice [d] aŭ [z]; [ng] ŝanĝiĝas al [m]; kaj [u] malfermiĝas je [e]. Oni renkontas ankaŭ tipajn nomajn ŝanĝojn: ekzemple [lu] iĝas [mulu] ("homo", "viro"), kaj [nin] ŝanĝiĝas al [gaŝan] ("virino", "sinjorino"). La cetero estas neatendebla por ni. Oni proponas ĉi-sube kelkajn ekzemplojn, kun kojnoformaj skribsignoj (laŭ novasira skribsistemo, tio estas unu el la skriboj de la unua jarmilo a.K.).

Oni komprenas Emesalon danke al la ekzistantaj dulingvaj aŭ trilingvaj tekstoj (do emesala-sumera-babilona): ĉefe temas pri la religiaj kantoj, pri kiuj mi traktis ĉi-supre. Alia fonto estas leksikaj listoj, kiuj estis similaj al vortaroj: nur sumerlingvaj aŭ dulingvaj (sumera-babilona), organizitaj laŭ temoj, laŭ signoj ktp. Tiuj listoj estis konsiderataj klasikaj tekstoj en Mezopotamio. Inter ili estis la Emesal-listoj, kiuj proponis ekvivalentojn inter Emesal, la sumera kaj la babilona, iomete kiel en nia ekzempla kompara tabelo.

**Konkludo**

Emesal verŝajne estas la unua artefarita lingvo en la homara historio, laŭ niaj nunaj konoj. Ĝi estas forte ligita kun sia origina lingvo, la sumera, kaj havas la saman gramatikon: malsamas nur kelke da sonoj kaj vortoj. Oni ne bone konas ĝiajn originojn. Tamen, en pli malfruaj epokoj ol la sumera (ĉefe unua jarmilo a.K.) Emesal estis, kune kun la sumera, la lingvo, per kiu oni kantis al la diaĵoj. Neniom temas pri helpa lingvo (kiel Volapuko aŭ Esperanto), nek pri ia serĉo pri perfekta lingvo (kiel iuj lingvoj kreitaj en Eŭropo; vidu la libron de Umberto Eco): Emesal estis lingvo kun magia kaj religia efiko.

**Thomas GENTY**

Fonto: Artikolo de Thomas Genty el Monato (**www.monato.net**) (Monato Revuo 2014/05, p. 22)
**http://www.monato.net/2014/011245.php**

## Miaj fruaj tagoj en Esperanto-Lando


**Allan Fineberg**

En 1958, mi estis 17-jaraĝa. Jam tiam mi interesiĝis pri lingvoj. En la vasta ĉef-biblioteko de mia hejmurbo, Jersey City, mi trovis la libron "The Story of Language" de Mario Pei, kiu enhavis liajn komentojn en du paĝoj pri Esperanto, kaj li rekomendis ĝin kiel bonan solvon al la problemo de internacia komunikado.

Mi ŝatis tion, kaj tuj mi reiris al la biblioteko, kaj trovis kelkajn jam kadukiĝintajn E-lernolibrojn.

Post iom da studado, mi trovis en telefon-libro la telefonnumeron kaj adreson de la tiama landasocio, EANA (Esperanto-Asocio de Norda Ameriko). Mi parolis kun la Ĝenerala Sekretario, George Alan Conner, kiu invitis min viziti ilin. Tie mi renkontis lin, lian edzinon, Dorothy, kaj Myron Michajliw, fuĝinto el Ukrainio kiu laboris en la oficejo/loĝejo de Conner. Alia vizitanto estis Joel (Joĉjo) Silverman, kiu tiam tre fervore esperantumis. Post multaj jaroj, mi aŭdis ke Silverman subite – kaj sen doni kialon – kabeis, kune kun edzino, Phyllis.

Kaj post iom da tempo, mi renkontis aliajn Esperantistojn, kelkajn frenezajn, kelkajn ĉarmajn kaj inteligentajn, kaj kelkajn kiel mi.....maldekstrulajn. Mi memoras klubanojn, kiel Frances Lesher, longtempa sekretario de unu el la du novjorkaj klubo (unu de EANA, alia de ELNA). Ŝi dum jaroj instruis kursojn de esperanto por plenkreskuloj, kvankam ŝi mem ne scipovis la lingvon. Alia, tre afabla, persono estis la hungaro, Ralph Bonesper. D-ro William Sulzbacher, tiam laboranta en Voĉo de Ameriko, D-ro John Lewine, unu el la fondintoj de ELNA. Inter miaj amikoj/samaĝuloj estis Eugene Calvert, Jonathan Pool, Joe Knowles, Szofia Knowles, Jim May, Dick Collin, kaj aliaj.



En Greenwich Village ni foje renkontiĝis Dimanĉe vespere en Kafejo Figaro. Tiujn rendevuojn mi memoras tre varme.

Jonathan Pool havis avon kiu estis tre konata: la Ĉefrabeno de la Hispana-Portugala (Sefarda) Sinagogo de Nov-Jorko, D-ro David de Sola Pool. Rabeno Pool havis someran domon ĉe Fajr-Insulo, kaj Jonathan petis permeson uzi ĝin dum somera semajnfino por li kaj liaj Esperanto-amikoj.

Por mi estis granda aventuro tiu semajnfino.

Tiuj tagoj de la 60-aj jaroj estis por ni, junaj Esperantistoj en Nov-Jorko, sufiĉe feliĉaj. Ni ofte renkontiĝis, kaj inter ni neniam ekzistis kverelado, argumentado. Politike ni ne havis grandajn diferencojn en niaj vidpunktoj de la mondo. Kiam estis grandaj protestoj en Vaŝingtono, DC kontraŭ la milito en Vietnamio, ni estis partoprenantoj.
Kaj kiam ni havis oportunon pasigi belan someran semajnfinon en Fajr-Insulo en la hejmo de la avo de Jonathan Pool, ni ja tuj akceptis la inviton. Ni estis grupo de ĉirkaŭ 10 personoj, inkluzive iuj, kiuj tute nek scipovis Esperanton, nek interesiĝis pri ĝi, sed estis amikoj de amikoj. Ni naĝis, malstreĉiĝis sur la strando....mi memoras Joe Knowles kun sia gitaro, kaj ni ĉiuj kune kantis. Humphrey Tonkin estis tie, mi memoras.

Sed tiuj spertoj iom post iom fariĝis pli kaj pli maloftaj:

kiam iu ano finis universitaton, aŭ iu alia trovis laboron en malproksima loko, aŭ perdis intereson en Esperanto, aŭ edziĝis, kaj tiel plu. Post iom da tempo, mi perdis kontakton kun tiuj amikoj de kara memoro. Kaj ĉar la interreto ne ankoraŭ ekzistis, mi malofte havis oportunon esperantumi.

Kun la elvolviĝo de la interreto mi denove povis enmerĝiĝi en Esperanto-Landon. Ĉiutage mi povas legi ĵurnalojn en Esperanto. Ĉiutage mi povas paroli kun amikoj en multaj landoj ĉie en la tero, ĉu per video, aŭ teksto. Mi povas sidiĝi eksterdome kaj per Facebook mi povas komuniki kun aliaj homoj pri multaj aferoj. Absolute mirakla afero kiel ĉio ŝanĝiĝis por mi dank'al teknologio.

Do, al vi, kara leganto, mi sendas mian adiaŭon kaj elkorajn bondezirojn. Uzu Esperanton kiel ŝlosilon al la mondo de interhoma frateco kaj paco. Fartu bone kaj ĝis la!

## Kio ni estas kaj kion ni celas (8 / fina)

### Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto, direktas ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo, deklaras nian intencon firmvole plu labori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj invitas ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuancoriĉan lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvoinstruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

**1. Demokratio.** Komunika sistemo kiu tutvive privilegias ĉiujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉ iu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, Ĝi ege superas iun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.
*>>> Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.*

**2.Transnacia edukado.** Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lernejano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lernejano kiu studas Esperanton, lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.
*>>> Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.*

**3.Pedagogia efikeco.** Nur malgranda procentaĵo el tiuj kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.
*>> Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.*

**4.Plurlingveco.** La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.
*>>> Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.*

**5. Lingvaj rajtoj.** La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.
*>>> Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado*

*sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.*

**6. Lingva diverseco.** La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivaĵospecio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.
*>>> Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.*


**7. Homa emancipiĝo.** Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo - projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.
*>>> Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.*

**<FINO>**

Fonto: **KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS -** Komentoj pri la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto - UEA Rotterdam 1999

## Dankon Amiko (8) - *de Claude Piron* - mez-nivela

**(11)**




Milan apenaŭ komencis postkuri la teroriston, jam oni atakis lin de malantaŭe. La postkurato ja ne laboris sola. Du kunuloj atendis lin ekstere. Ilia tasko estis kontroli la diversajn pordojn de la ĉiovendejo, por la okazo, se iu el ties gravuloj venus kaj per ŝlosilo enirus tra unu el ili.

Ĉar la magazeno estis grandega kaj havis enirejojn ĉe kvar stratoj, ili devis konstante rondpaŝi ĝin. Ili konis la horojn de la Sekuriksvojiro kaj laŭ ilia plano la ĉefo devis eniri la konstruaĵon post paso de la gardisto. Ili kompreneble ne povis scii, ke ĉi-nokte la gardisto estas komencanto, homo ne tre praktika, kiu ne povis ne malfrui en sia rondirado. Kiam Rikardo eniris, ambaŭ kunuloj troviĝis ĉe la alia flanko de la granda magazeno, tiel ke ili ne povis vidi lin, sed ili trankvilpaŝe alvenis al la flanko, kie ilia ĉefo eniris, ĝustatempe por mire konstati, ke tiu kure foriras kaj ke iu eksekvas lin.

Ilia interveno estis rapida kaj trafa. Post kelkaj momentoj, Milan kuŝis sur la trotuaro, senkonscia kaj kun videblaj batmarkoj.

**(12)**

"Mi havas ideon," Katarina diris. "Eble ĝi ebligos al vi rilati pli malfrue kun la polico. Aŭ eble eĉ tute ne." Ĉi-lastan parton ŝi ne kredis, sed, laŭ ŝia opinio, ne gravis malveri, se tio povis remeti iom da trankvilo en la koron de la tremanta knabo.

"Ideon, ĉu? Kiun?!"

"Vi iru daŭrigi vian gardistan kontrol-iron. Mi telefonos al Sekuriks, ke vi eliris por postkuri teroriston, sed vi komprenis, ke vi ne havas ŝancon lin trafi. Tiam vi vidis min, kiun vi konas kaj fidas, kaj petis min telefoni al Sekuriks kaj al la polico, restante ĉi tie por montri, kie troviĝas tiu suspektinda afero. Dume vi daŭrigas vian noktan gardo-iron, pri kiu vi nun kontraŭvole malfruis. Tiel ili rilatos nur kun mi, kaj plej alte estimos vin: post tia aventuro, via unua penso ja estis nur via respondeco de Sekuriks-gardisto."

"Daŭrigi, mi, nun, post ĉio ĉi, ĉu? Sed mi apenaŭ kapablas pensi!"

"Des pli bone! Ne pensu. Nur reprenu vian paperon kun la indiko de la sinsekvaj taskoj, iru al la domo, kie vi devas iri post Plinov, kaj daŭrigu plu."

"Almenaŭ tiel mi ne devos mem telefoni al Sekuriks aŭ al la polico! Dankon, Katarina, ŝajnas al mi, ke via ideo estas bona. Ĉu vi tiel ĉiam pravas?"

"Eble ne tute ĉiam, sed ofte, kara, plej ofte."

Dum Rikardo paŝis for, senpezigita pro la eblo ne telefoni mem al tiuj timigaj oficejoj, la vorto "kara" plaĉe resonis en liaj oreloj.

**(daŭrigota)**

## Finiĝis la 102-a UK ! - festparolado de M.Fettes dum Solena Malfermo en Seulo

Estimataj honoraj gastoj, karaj kongresanoj,

En ĉi tiu horo kaj loko ni spertas denove tiun miraklon, kiu nomiĝas Universala Kongreso de Esperanto. Kiel fenikso renaskiĝante el cindroj, ĉiujare dum unu semajno reaperas, ie en la mondo, la kultura ĉefurbo de la esperantistoj. Kial nomi ĝin miraklo? Pro tio ke ĝi estas ĉiam rekoneble la sama urbo, sendepende de tio, ĉu ĝi troviĝas en Havano aŭ Helsinko, en Vieno aŭ Vankuvero, en Tokio aŭ Telavivo. Alvenas la unuaj dekoj da homoj, tiam la unuaj centoj, kaj kun ili ekŝvelas la granda ondo de renkontiĝoj kaj babiladoj, de kunmanĝado kaj kunkantado, de prelegoj kaj kunsidoj kaj konversaciaj rondoj, de teatraĵoj kaj koncertoj kaj konkursoj, de ĉiuj manieroj uzi lingvon por kunligi homojn. Tia estas nia urbo. Bonvenon en ĝin!

Mi konfesu tuj, ke ni ne havas ĉiujn zorgojn, kiujn havas ordinara urbo. Se temas pri loĝejoj kaj transportiloj kaj akvo kaj elektro, se temas pri vendejoj kaj polico kaj hospitaloj, ni povas feliĉe lasi tiujn servojn en la manoj de niaj gastigantoj — ĉi tie la koreoj, kiuj pruvas sin je ĉiu paŝo ege bonaj gastejestroj. Ni estas aparte feliĉaj, ke ĉi-foje honoris nin per sia ĉeesto niaj efektivaj gastejestroj: unuavice la urbesto de Seulo mem, kaj duavice la prezidanto de Hankuk Universitato de Frendlingvaj Studoj, nia kongresejo. Ni kore dankas ilin ambaŭ kaj ĉiujn iliajn kolegojn en la urbaj kaj universitataj servoj, kiuj zorgas pri ni dum ĉi tiu semajno!

Ni estas, do, iusence urbo de gastoj. Ni pensu pri tio dum momento. Ja ekzistas diversaj specoj de gastoj — eĉ de esperantistaj gastoj! Estas gastoj kiuj malplenigas la fridujon kaj la vinŝrankon, tretas koton tra la domo, piedbatas la hundon kaj insultas la najbarojn. Aliflanke, estas gastoj kiuj kunportas donacojn, komplimentas pro la manĝoj, helpas pri la purigado, kaj ludas kun la infanoj. Fari tion kapable kaj bele ne estas tiel simpla afero. Oni devas lerni esti tia gasto, kaj kredeble re- kaj relernadi, ĉar en ĉiu vojaĝo oni renkontas novajn homojn, novajn kulturojn, novajn situaciojn. Lerni bone gasti similas al la lernado de lingvoj; ĉiam restas pli por malkovri.

Mi pensas ke Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, estis ankaŭ nia unua granda teoriisto pri gastado. Jam en la Unua Libro li skribis pri sia vizio pri lingvo, kiu "ne entrudiĝante en la doman vivon de la popoloj, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa." Per tia priskribo ni povas bildigi al ni Esperanton ĝuste kiel bonan gaston, kiu apenaŭ ĝenas "la doman vivon" de siaj gastigantoj, dum ĝi alportas valorajn donacojn, interalie pli vastan komunikadon kaj pli profundan egalecon. Kaj dudek kvin jarojn poste, kiam Zamenhof turnis sin ĉiam pli energie al la ideo de homaranismo, ni povas vidi en tio daŭrigon de lia insistado pri la gasta etiko. Ĉar la homaranismo esence konsistas el principoj por harmonia kunvivado kun aliaj homoj, kaj la Deklaracio pri Homaranismo estas kvazaŭ konsilaro pri bona gastado en mondo de granda diverseco lingva, kultura kaj religia.



Ĉi-jare ni solenas la centan datrevenon de la morto de Zamenhof. Tra la mondo okazas ceremonioj, simpozioj, konferencoj dediĉitaj al lia vivoverko. Sed mi volas pledi por ankoraŭ pli vasta kompreno de ĝia signifo, kiel elemento en la daŭranta homara strebo vivi harmonie sur nia malgranda kaj unika planedo. Ŝajnas klare al mi, ke se Zamenhof vivus hodiaŭ, li senrezerve aliĝus al tiuj, kiuj alvokas por pli ekologi-konforma konduto de niaj nuntempaj socioj. Kiel ni ĉiuj povas atesti, nia industria civilizacio, inventaĵo de la lastaj jarcentoj, tendencas al troa, eĉ senbrida eksplutado de la naturo, kondutante ĝuste kiel la plej malbona gasto imagebla, kiu ne nur malpurigas la domon sed en la fino detruas ĝin. Tio estas precize la malo de la konduto, kiun rekomendus Zamenhof, ĉar se ni sekvas lian pensofluon, homarano ne povus esti alia ol bona samterano. Ambaŭkaze temas pri bona gastado, kun identa etika sinteno: paŝi leĝere, ami la aliulon, celi al daŭripovaj rilatoj de reciprokeco. Se la aliulo povas esti ankaŭ besto, planto, rivero, dezerto, arbaro, aŭ kiu ajn alia parto de la naturo, tio ŝanĝas nenion esencan pri la dezirinda konduto.

Tiuj pensoj venis al mi kvazaŭ enkonduke al nia ĉi-jara kongresa temo: "Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo." Unuavide tiu temo ŝajnas malproksime de la pensaj kontribuoj de Zamenhof, ĉe kiu oni vane serĉus vortojn kiel "daŭripovo" kaj "ekologio," ĉar en lia epoko oni ankoraŭ ne elpensis ilin. Pli profunda rigardo tamen montras la grandan kongruon inter lia rezonado kaj tiuj nuntempaj konceptoj. Daŭripovo, ni povus diri, estas nia nuntempa maniero paroli pri ne-entrudiĝemo, tiu zamenhofa koncepto kiun ni retrovas jam en la Unua Libro. Daŭripova socia evoluo estas tia evoluo, kiu reduktas la trudiĝemon de la socio al la ekologiaj kaj kulturaj sistemoj kiuj vivtenas ĝin. Kaj daŭripova turismo estas tia turismo, kiu celas disvolviĝi konforme al la bezonoj kaj kapabloj de la gastiganta lando kaj popolo, kontribuante al ĝia ekonomia, ekologia kaj kultura bonfarto. Kiel bona

gasto.

Bona gasto ankaŭ strebas lerni de siaj gastigantoj. Kaj do por kelkaj minutoj mi invitas vin akompani min tra la vivoverko de korea pensulo, homo kiu vivis pli ol mil jarojn antaŭ Zamenhof, sed kiu ŝajnas al mi lia spirita parenco. Lia nomo estis Choi Chiwon; poste en sia vivo li alprenis la kromnomon Go-un, "Soleca Nubo." Kiel Zamenhof, li naskiĝis en reĝlando ĉe la periferio de granda imperio, la ĉina Tang-dinastio. Zamenhof edukiĝis en la rusa, fine vojaĝante al Moskvo por siaj universitataj studoj; Choi edukiĝis en la ĉina, irante nur 11-jara al Xian por enskribiĝi en la klasika imperia studsistemo; li restos for el Koreio ĝis sia 27-a jaro . Kaj ambaŭ homoj revenis hejmen forte konvinkitaj pri la bezono de spirita-etika reorientiĝo en la socio ĉirkaŭ si, al kiu ili dediĉos la reston de sia vivo.

Kiel Zamenhof, Choi pensis tute neortodokse. Li malakceptis la tradiciajn dividojn inter popoloj, ŝtatoj kaj religioj, resumante sian sintenon per la vortoj:

*La vero ne malproksimas de la homo,*
*Por homo ne ekzistas lando fremda.*

Ĉerpante el profunda kono de la instruoj de Konfuceo, Laŭzio kaj Budho, li pledis por ilia kunigo en komuna harmonia tuto kiun li nomis pung-nyu, laŭvorte "vent-fluado," sed kiu esprimas specon de serena kaj malfermkora vivĝojo. Proksimeco al la naturo estas esenca dimensio de tiu spirita orientiĝo, kaj efektive Choi pasigis siajn lastajn jardekojn kiel soleca saĝulo ĉe la montoj, verkante multajn naturpoemojn kune kun traktaĵoj pri filozofio kaj historio.

Kaj tamen ni devas konfesi, ke ambaŭ homoj iusence malsukcesis, laŭ siaj propraj kriterioj. Zamenhof, kiel ni scias, mortis meze de la Unua Mondmilito, laca kaj malgaja pro tiu eksplodo de interpopola malamikeco, kontraŭ kiu li luktis la tutan vivon. Kaj Choi vivis sufiĉe longe por vidi la definitivan disfalon de ambaŭ dinastioj, la ĉina Tang kaj la korea Silla, kiujn li provis renovigi kaj redirekti per siaj instruoj.

Kion do ni povas lerni, rigardante kune al la hebrea-rusa pensulo kaj la korea-ĉina pensulo, disigitaj de vastaj spacoj de tero, tempo kaj tradicio? Unue, ke la strebo kompreni la mondon kiel homo, preter la limoj de sia propra eduko, estas strebo vere universala. Ĝi ankaŭ klare estas strebo malfacila, en kiu oni riskas, kiel diris Zamenhof, "la batojn de l' sorto, la mokojn de l' homoj." Eĉ Choi, kies verkaro dum longa tempo estis konsiderata esenca parto de la korea kultura heredaĵo, devis suferi en pli modernaj tempoj la kritikojn de la naciistoj, kiuj opiniis lian amon al la ĉina kulturo kvazaŭ perfido al la patrujo. La batalo kontraŭ ŝovinismo kaj fremdulmalamo estas batalo eterna, en kiu oni malverŝajne atingos definitivan venkon.

Due, ĉe ambaŭ pensuloj ni vidas ke amo al la homaro kunezistas kun amo al la propra gento, la propra hejmlando, kaj aparte ĉe Choi, la propra tero. Oni ne lernas esti bona gasto nur per vojaĝado; oni devas ankaŭ lerni kaj praktiki tion hejme. Zamenhof kompreneble estis sindediĉa filo, frato, edzo kaj patro; li estis ankaŭ klera hebreo, "hebreo el la getto" kiel li mem deklaris sin, kaj lia vivoverko portas multajn spurojn de tiuj ligitecoj. Choi, reveninte al Koreio unuavice por prizorgi siajn gepatrojn, malkovris kaj esprimis en siaj postaj jaroj profundan spiritan rilaton kun la korea naturo. Al mi tio ŝajnas grava kaj foje subtaskata aspekto de la esperantista tradicio — ke nia movado kultivas ne nur vojaĝemon kaj internacian amikecon, sed ankaŭ aprezon de la propraj radikoj, certe lingvaj, sed ankaŭ kulturaj kaj eĉ ekologiaj. Tio estas nepre parto de la vojoj al daŭripovo, pri kiu indas diskuti ĉi-kongrese.

Trie, tiu gasta etiko, kiun Choi kaj Zamenhof ambaŭ siamaniere primeditis kaj disvolvis, konsistas en sinteno kaj praktiko ne nur sciencaj sed ankaŭ artaj. Ne ŝajnas al mi hazarde, ke ambaŭ homoj estis ankaŭ poetoj, kies plej famaj ideoj ofte esprimiĝis verse kaj metafore. Por ni esperantistoj, la muroj de miljaroj, la monto granita, la stelo en nokta ĉielo, tiuj kaj multaj aliaj stilfiguroj de Zamenhof formas parton de nia memkompreno. Kaj Choi sukcesis kapti, per elegante simplaj naturbildoj, la animstaton de homo vojaĝanta inter hejmoj:

*La ŝipo laŭ la plano venas ĉiun duan jaron;*
*Hontas sentaŭgulo hejmeniri purpurrobe.*
*Abrupta adiaŭo en Ŭuŝengo folifale;*
*Nun al Ŝilla alrigardi, kie fonas foraj floroj.*

*Iktero en la valo fluegemas longe, alte;*
*Porkoj de Ljaŭdongo senhonte spikumadas.*
*Volfirmo nepras nun, por poste ne bedaŭri.*
*Mi tostas sorĉan belon de ĉi natur' Gŭanglinga.*

Se vi sentas iom da malgajo en tiuj linioj, vi certe pravas. Bona gasto, bona turisto, kunportas kun si hejmsopiron. Kaj mi celas ne nur sopiron al la fizika hejmo, sed al hejmeco, al sento de aparteno. Ĉar ĉu ne ĝuste tion ni ĉiuj serĉas, ni kongresanoj, kiuj vojaĝis centojn kaj milojn da kilometroj por esti kune ĉi tie, por dum unu semajno senti nin samurbanoj? Ni trovas, aŭ esperas trovi, senton de aparteno kiu estas alia ol tiu kiun ni sentas en niaj loĝlokoj, alternativan hejmecon kiu kompletigas kaj pliriĉigas niajn aliajn hejmecojn.

Jen do nia paradoksa konkludo. Daŭripova turisto — en la zamenhofa lingvaĵo, homarano — estas

homo, kiu sentas sin ĉiam kaj ĉie samtempe hejme kaj gaste. Ni paŝas zorge en la hejmoj de aliaj, ĉar ni komprenas, ke ili estas ankaŭ niaj hejmoj. Ni traktas delikate kaj ameme la propran hejmon, ĉar ni komprenas, ke ankaŭ tie ni finfine estas gastoj. Jes, ni ĉiuj estas gastoj sur ĉi tiu tero, kiun ni vizitas por tro mallonga tempo, apenaŭ sufiĉe por kompreni nin mem, por ne paroli pri la kompreno de niaj samteranoj. Tio estas nia sorto, kiel niaj grandaj antaŭuloj kiel Choi kaj Zamenhof klopodis klarigi al ni siamaniere, per siaj verkoj kaj siaj vivoj.

La kongresa semajno etendiĝas antaŭ ni. Mi esperas ke vi jam nun komencas senti vin hejme en nia urbo de gastoj. Mi esperas ke la multaj riĉaĵoj de la programo liveros abundajn okazojn por sperti apartenon, por kleriĝi pri nia kulturo, por disvolvi vian esperantistecon. Kaj mi esperas ke vi samtempe profitos la ŝancon ekkoni Koreion, se vi venis ĉi tien el alia lando, ekkoni ĝin kiel la hejmon de la koreoj sed ankaŭ de la korea naturo, sen kiu ĝi ne estus Koreio. La vojo al daŭripovo iras tra miloj kaj milionoj da tiaj spertoj, per kiuj ni lernas ami la diversecon de la mondo kaj labori por ĝia protektado kaj prizorgo. Kiel bonaj gastoj.

**D-ro Mark Fettes**
Prezidanto de UEA

## Finiĝis la 102-a UK ! - rezolucio de la Kongreso

Ni, 1174 partoprenantoj en la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj al Seulo, Koreio,

**Volante kontribui**
al la laboroj por la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por 2017,

**Diskutinte**
la temon "Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo" en pluraj sesioj kaj el multaj vidpunktoj tra la kongresa semajno,

**Konstatante**
la gravecon de daŭripova turismo por la tutmonda Esperanto-lingvokomunumo, kies anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj,

**Emfazante**
la esencan rolon kiun ludas komuna lingvokono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo;

**Asertas**
la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn;

**Invitas**
aktivulojn pri daŭripova turismo konsciiĝi pri la grandaj avantaĝoj de komuna neŭtrala lingvo por la kultivado de respondecaj kaj reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj gastigantoj;

**Konfirmas**
la volon de nia movado daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj konscia turisma kulturo.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015BJ Rotterdam, Netherlands
**www.uea.org info@uea.org**

Fonto: **http://www.espero.com.cn/2017-08/11/content_41391501.htm**

## El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (13)

### EL LA UNUA PARTO - TAŬO

**26**

La pezo estas la radiko de la malpezo,
La senmoveco estas la mastro de la movo.

Tial la Saĝulo, vojaĝante la tuta tagon,
Neniam forlasas sian pakaĵĉaron.
Ĝuante luksan kaj komfortan vivon,
Li ne dronas en ĝi.
Kiel do povas esti, ke la reganto de regno de dek mil militĉaroj
malgrandigas sian gravecon sub Ĉielo?
La malpezeco neeviteble kondukas al la perdo de la radiko.
La leĝera movo neeviteble rezultigas la perdon de la mastreco.

**Rimarkoj de Cesar**

Rikardo Vilhelmo mencias interesan tekstvariaĵon en la lasta linio: "Pro leĝero oni perdas la ministrojn, pro maltrankvilo la reganton."

Rikardo Vilhelmo, kiu vojaĝis plurfoje al Ĉinio kaj tie eĉ vivis kaj laboris kiel teologo kaj instruisto, ekzemple en Pekino dum la jaroj 1922 ĝis 1924, kaj kiu havis eĉ ĉinan edzinon, raportas, ke en Ĉinio nepre necesas ĉiam havi la pakaĵon ĉe si, ĉar la tranoktejoj ofte ne havis litaĵojn, do tiujn la vojaĝanto nepre devis havi ĉe si, se li ne volis travivi diversajn grandajn malagrablaĵojn. Tial ankaŭ jam Laocio pro tiaj kaŭzoj neniam disiĝis de sia pakaĵo, se li vojaĝis.

Tio, laŭ Anniespera nun ŝanĝiĝis. Do, leganto, tute ne timu! Vi povas ĝui la belan Ĉinion en nia tempo kompreneble sen kunprenitaj litaĵoj kaj sen pakaĵa ĉaro. Kaj esperantistoj volonte akceptas vin kiel gaston.

**27**

Bona migranto ne postlasas spuron.
Bona parolanto ne devas refuti ion.
Bona kalkulanto ne bezonas kalkulbastonetojn.
Bona fermulo bezonas nek seruron nek ŝlosilon,
kaj tamen neniu povas malfermi tion, kion li fermis.
Bona kunligulo bezonas nek ŝnuron nek rubandon,
kaj tamen neniu povas malligi tion, kion li kunligis.
La saĝulo ĉiam bone komprenas savi la homojn;
tial por li ne ekzistas kondamnindaj homoj.
Li ĉiam bone komprenas savi la aĵojn;
tial por li ne ekzistas forĵetindaj aĵoj.
Tio estas heredi la klarecon.
Tiel la bonaj homoj estas la instruistoj de la nebonuloj,
kaj la nebonaj homoj estas la materialo por la bonuloj.
Tiu, kiu ne honorus sian instruiston
kaj tiu, kiu ne ŝatus sian materialon,
grave erarus, spite al ĉiuj siaj scioj.
Tio estas la granda sekreto.

**Rimarkoj de Cezar**

Ĉar seruroj kaj ŝlosiloj certe ne ekzistis en la tempo de Laocio, la traduko de Wang Chongfang evidente estas pli bona: "Tiu, kiu estas lerta en fermado, bezonas neniajn riglilojn por fermi tion, kio ne estos malfermebla por aliaj." La moko pri tiuj, kiuj havas neniujn aliajn zorgojn krom gardi per suspektemaj okuloj siajn valorkestojn, trezorojn, konkubinojn kaj heredaĵojn per enfermado, ne estas preterlegebla. Tiu, kiu povas rezigni pri tro da riĉo, ne priŝteleblas kaj entute vivas multe pli senzorge. Jen la enhavo ankaŭ de fama fabelo de fratoj Grimm: Feliĉa Joĉjo.
La kalkulbastonetoj de Rikardo Vilhelmo ĉe Wang Chongfang estas kalkulmarkoj. Sed ankaŭ bastonetoj laŭ Anniespera en antikva Ĉinio estis uzataj por la kalkulado.
Ke laŭ Laocio bona migranto ne postlasas spuron, cetere estis esenca parto de la vivfilozofio de la verkisto B.Traven. Eĉ mane skribitaj subskriboj por eldonistaj kontraktoj de li apenaŭ riceveblis.

**(daŭrigota)**

## Ŝercoj



En la lernejo la instruistino demandas du knabetojn:
— Peĉjo, kio vi fariĝos, kiam vi estos plenkreskulo?
— Policisto.
— Ĝi estas bela promeso. Ĉu vi Joĉjo?
— Ne, mi fariĝos krimulo.
— Ĉu krimulo? Kial?
— Por ke mi povu ludi kun Peĉjo.

* * *

— Knabeto, kio vi fariĝos, se vi ĉiam mensogas?
— Politikisto.

* * *




Kvar soldatoj portas pezegan skatolon. Viro demandas:
— Kion vi portas?
— Militsekreto.
— Ĉu la skatolo estas tiom pezega?
— Jes kompreneble, ĝi estas plenplena de raketoj.

### sendis Mustafa Kaptan, el Turkujo




Nia Temel [*] iun tagon iris al la domo de Dursun [*]. Dum en la domo, komencis pluvego, do Dursun diris:
- Temel, restu ĉe mi ĉi nokte.
Temel konsentis kaj diris "bone". Dum Dursun estis preparanta liton por Temel, Temel malaperis kaj post 10 minutoj li reaperis kaj frapis la pordon. Dursun malfermis la pordon kaj kiam li vidis Temel-on en malseka stato li demandis:
- Temel, kial vi foriris? Kie vi iris?
Temel respondis:
- Mi iris hejmen por alporti mian piĵamon!

---

[*] *Temel, Dursun, Idris ktp estas nomoj de naivaj homoj, kiuj rolas en multaj turkaj ŝercoj. Ili ŝajne estas el la nord-orientaj urboj apud la Nigra Maro.*

## Kruĉvort-enigmo

**Horizontale**



1. Homo perdinta la prudenton pro mensa malsano; Numeralo.
2. Spirebla nesimpla gaso, kiu ĉirkaŭas Teron; Konsistanta el pli-malpli pura oro; Senkolora, kristala, solvebla substanc', uzata por gustigi nutraĵojn aŭ por gardi ilin de putrado.
3. (inverse) Ĉiu plurjara plant' bambuaspekta, kun tigo alta, fortika kaj kava; Pulm' (en kunmetaĵoj).
4. (inverse) Vertikala dimensi' en la suprenira direkto; Ĉefurb', en la antikveco, de la Imperio, en la nuntempo, de Italio; (inverse) Fervora admiranto de artisto, muzikgrupo, sporta teamo ks.
5. Ĉefurbo de itala aŭtonoma regiono ĉe Alpoj, kun loĝantaro parte franclingva; Vorto, uzata por distingi objekton aŭ estaĵon disde aliaj.
6. (sufikso) Persono aŭ objekto, kiu plenumas iun procezon.
7. Parolfiguro, konsistanta en la esprimado de penso per vortoj malaj; (inverse) Muzikaĵo por voĉoj, kun aŭ sen akompanaĵo.
8. Ŝveligi aertubon de aŭto per kunpremita aero; Pentristo kaj arkitekto de la itala Renesanco (1483—1520).
9. Vasta longa senmanika vesto, per kiu oni kovras la aliajn vestojn; Interjekcio, esprimanta ĝeman plendon pro kordoloro.
10. Influi per karesaj aŭ flataj agoj aŭ vortoj, por ricevi dezirataĵon; Tuto de la disĉiploj de filozofo, verkisto artisto, sciencisto ktp, kiun ili rigardas kiel sian majstron; aro aŭ sinsekvo de adeptoj de la sama doktrino, principo aŭ afero.

**Vertikale**

1. Imagoplena.
2. Tio, kio efektive ekzistas, sendepende de nia perceptokapablo kaj konceptomaniero; Rilata, al movi boaton sur akvo antaŭenpuŝante ĝin per speciala ligna ilo.
3. En maniero, de Osto de mamuloj kaj birdoj, konsistanta el kelkaj kunkreskintaj vertebroj; Objekto el oro, precipe juvelo ks.
4. Nomo de la dekoka grafemo de la E-a alfabeto; Komuna nomo de diversaspecaj vegetaĵaj substancoj, abundaj i.a. en la ŝelo de kverko, kaŝtanarbo kaj sumako, kaj kiuj igas la felojn putr-imunaj.
5. Turni la antaŭbrakon tiel, ke la polmo rigardas malsupren; (senvokala) Teksaĵo el linaj, kanabaj, jutaj, kotonaj fadenoj, interkrucitaj laŭ aparta sistemo.
6. Strio el ŝtofo, ledo ktp por ĉirkaŭigi la talion; Batali en cirko kontraŭ taŭro.
7. Patologia troo en la sango de tre diversaj toksaj substancoj kaj de ureo, kutime eliminataj en la urino; (inverse) Silabo, kiu montras en la relativa solfeĝo la sesan tonon super la toniko.
8. Prepozicio esprimanta ĝenerale la konformecon, kaj pli precize montranta iradon de unu ĝis alia fino de objekto longforma, kies direkton oni sekvas; (inverse) Plej komforta kanapo, kun dikaj kusenoj, sur kiu tri personoj povas sidi aŭ unu kuŝe ripozi.
9. rilata al periodo de la luna rivoluo depende de la rilatpunkto.
10. Aŭdebla aervibrado; Filo de frato aŭ fratino.
11. (inverse) Solidiĝinta suko de frakseno, uzata kiel laksiga medikamento; Form' de geno.
12. (senvokala) Parto de la korpo de bestoj aŭ homoj, kuniganta la kapon kun la trunko; Loko, kie vojo, tubo ks disiĝas al du aŭ pluraj direktoj.

**(la solvo troviĝas en la lasta paĝo)**

## Mallonga Historio de Filozofio (20)




**Saluton,**

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun filozofo Immanuel Kant

**Vasil Kadifeli**

**Immanuel Kant (1724-1804) - parto 1**

Se vi uzas rozkolorajn okulvitrojn eble vi povas forgesi tion, sed vi daŭre perceptos la mondon rozkolore. Immanuel Kant pensis, ke ni ĉiuj, en la menso, filtras la mondon per tiaj okulvitroj kaj ni perceptas la mondon kaj vivas laŭe. Kvankam la ŝanĝoj en la mondo okazas laŭ tempo kaj spaco, kaj havas siajn proprajn kialojn, eĉ se ni forigas niajn okulvitrojn ni perceptos la mondon same. Ni dependas al tiu filtro kaj sen ĝi, ni ne povus percepti la mondon. Tamen ni povas akcepti kaj scii, ke tiu filtro estas tie kaj ni povas konsciiĝi kial kaj kiel ni vidas la aferojn.



La menso de Kant estis klara, li neniam edziĝis kaj li vivis ĉiun sian tagon kun disciplino. Li havis tre produktivan vivo kaj verkis multajn librojn kaj artikolojn. Li instruis en universitato. Li vivis tre akuratan vivon, tiel ke homoj agordis siajn horloĝojn laŭ liaj tagaj kutimoj. Kiel ĉiuj filozofoj, li ankaŭ provis kompreni nian rilaton kun realeco, kvankam tiu estas temo de metafiziko5. Li estas unu el la plej famaj metafizikistoj. Lin interesiĝis la limoj de penso te la limoj de nia kompreno kaj scio.

En la jao 1781 li verkis sian faman kaj malfacile kompreneblan libron "Kritiko de Pura Racio". Li tre zorge kaj komplekse rezonadis por malkovri tion, kion li volis. Estas malmultaj homoj kiuj komprenas liajn pensojn en tiu libro kaj tion li eĉ mem akceptis.

Al kio ŝajnas realeco? Li diris ke ni neniam havos klaran bildon de tio, al kio ŝajnas la "aĵoj". Li kelkfoje uzis la vorton "noumenon" 1 (sing.) kaj kelkfoje "noumena" (pl.) pri la "aĵoj" kaj poste ankaŭ Hegel kritikis lin pri tio ĉar ni ne povas scii, se la realeco estas singulara aŭ plurala. Fakte ni nenion povas scii pri tiu "numenala" mondo. Sed ni povas scii pri la mondo de "fenomenoj" dank al niaj sencoj. Tiuj, kiujn ni vidas rigardante el la fenestro estas la "fenomenoj", sed la "noumenala" mondo kaŝas sin post niaj spertoj. Do kelkaj aspektoj de la ekzistaĵoj estos preter nia kompreno.

En tiu libro, lia ĉefa demando estis "kiel povas esti "sinteza apriora2 juĝo?". Certe tio ne faras sencon por vi. Unue "sinteza" signifas "analitika", kies signifo estas "vera, ĝusta". Ekzemple, "ĉiuj virhomoj estas viraj" estas "vera" frazo kaj ni ne bezonas plian observadon kaj esploron por tio. Alia ekzemplo povas esti "ĉiuj mamuloj mamnutras siajn idojn". La vorto "mamulo" ja enhavas la signifon de "mamnutrado".

Tamen "sinteza informo" bezonas spertadon kaj observadon. Ekzemple "citronoj estas acidaj" aŭ "katoj estas vostohavaj" estas tiaj asertoj por kiuj ni devas fari observadon kaj sperti ke ili estas veraj. Ni devas gustumi multajn citronojn aŭ vidi multajn katojn antaŭ ol konkludi, ke tiuj asertoj estas veraj. La difino de "citrono" aŭ "kato" ne enhavas tian informon en ili.

Do, kio estas "sinteza apriora juĝo". "Apriora" signifas ke ni ne bezonas spertadon kaj observadon por tio. Ĉu ni povas scii ion "apriore"? La respondo laŭ Locke (vidu #016) kiu estis empiristo3 estis negativa, sed laŭ Descartes (vidu #013) kiu estis racionalisto4 estis pozitiva. Do oni povas pensi ke "analitika" kaj "apriora" estas samaj. Sed laŭ Kant ili ne estis samaj. Pro tio li kreis la terminon "sinteza apriora juĝo". Li donis simplan ekzemplon: 7+5=12. Multaj filozofoj pensas, ke tiaj faktoj rilatas al analitika matematika rezonado. Sed Kant diris, ke tion ni povas scii apriore.

Se Kant pravas, tiam li estas revoluciisto, ĉar la antaŭaj filozoj preceptis la "naturon de realeco" kiel la spertado kiun ni ne povas percepti. Sed Kant sugestis, ke ni tion povas malkovri per la povo de nia menso. Kant ne nur pruvis, ke ni portas rozkolorajn okulvitrojn sed li ankaŭ pruvis, ke la mondon ni nepre devas percepti rozkolore. Li malkovris tutan gamon de rozkoloraj nuancoj. Post ke li kontetiĝis pri nia rilato al realeco, li turnis sin al la temo de "etiko". Sed por tio vi devas atendi le venontan numeron (parto 2)

-----

1 **noumen/o** : Objekto de pura pensado aŭ de racia intuo, senigita je ĉiuj sensaj elementoj: Kantio asertas, ke, kvankam la noumeno malhavas ĉian econ de fenomeno, ĝi estas la plej praktika realo en la konscio pri devo.

2 **aprior/a** : Bazita sur teorio, ne dependanta de faktoj aŭ spertoj

3 **empiri/o** : Sperto, rigardata kiel bazo k kogna kriterio de filozofio k scienco

4 **racional/a** : Rezultanta el la scio de reguloj, deduktitaj el la ĝeneralaj principoj logikaj aŭ sciencaj

5 **metafizik/o** : Parto de la filozofio pri la unuaj kaŭzoj k principoj de ĉio, kiuj estas neesploreblaj per la metodoj de la pozitivaj sciencoj.

**(daŭrigota)**

## La sciencfikcia bibilioteko de Istanbulo

verkis Başak Aray, el Turkujo

**Özgen Berkol Doğan** estis juna turka fizikisto, kiu forpasis en aviadila akcidento en la jaro 2007. Tiam li estis survoje por atingi fizikan kongreson en Isparta (urbo en centra Turkujo) kun siaj instruistoj kaj kunlaborantoj. Krom sia faka sukceso, li estis plurfakulo, kiu ankaŭ tradukis sciencfikciajn romanojn, li dancis tangon, praktikis alpismon kaj partoprenis en savadaj operacioj post la 1999-a tertremo de Marmara.



Ekde lia morto, kiam li estis 27-jaraĝa, sia familio batalis por ĵusteco pri la akcidento. Malgraŭ ilia granda ĉagreno, la gepatroj de Berkol trovis bonegan manieron por vivigi la memoron de ilia filo. Ĉar Berkol estis granda amanto de sciencfikcio, ili fondis bibliotekon dediĉitan al lia pasio. Ĝi troviĝas en Moda kvartalo (en la centro de la azia parto de Istanbulo) kaj enhavas impresan kolekton de sciencfikciaj kaj fantaziaj libroj en multaj lingvoj. Oni povas legi surloke, sed ankaŭ eblas pruntepreni librojn se oni fariĝas abonanto.

La sciencfikcia biblioteko ankaŭ organizas eventojn rilate al la interesoj de Berkol. Ĉiu ĵaŭda vespero okazas renkontiĝo de specialistoj pri scienco, teknologio, sciencfikcio au ĝenerala literaturo.



La bona novaĵo por ni esperantistoj estas, ke la teamo ege interesiĝis pri nia lingvo kiam mi parolis pri ĝi. Mi petis dediĉi unu ĵaŭdan vesperon ĉijare al Esperanto. La propono estis kore akceptita. Ili eĉ proponis al ni organizi kurson de Esperanto. En julio la biblioteko translokiĝis en sia nova, pli granda loko, kie eblas gastigi tiajn eventojn pli komforte. Ni planas organizi unue renkontiĝon por prezenti Esperanton kaj poste eble organizos kurson por instrui ĝin. Tiel, kiam homoj informiĝos pri Esperanto, ili ankaŭ trovos la ŝancon lerni ĝin. Ni anoncos la eventojn pli detale post la decido pri datoj kaj prelegontoj.



La sciencfikcia biblioteko estas unika en nia lando, kaj ideale situata en agrabla kvartalo. Ĝia nova loko estas renovigita malnovstila Istanbula domo, kun kvar niveloj kaj ĝardeneto, kiu tute meritas viziton. Ni esperas komenci daŭran kunlaboradon baldaŭe.

**http://ozgenberkoldogan.com**
**http://www.facebook.com/OzgenBerkolDoganBilimkurguKutuphanesi/**

## Kredodeklaracio

poemo de Roland Platteau, el Francio




verkis france (1977) kaj esperantigis Roland PLATTEAU

***Vivo faritas por rigardi la belajn***
***trafikŝtopiĝojn,***
***Por sin interkisi frenezege,***
***Por prirevi el la nuboj sinfoniojn,***
***Por dumaŭgusti varmege.***

***Vivo estas farita por en  nebul' foriri***
***Drone en ĝia vapora blankeco,***
***Dum jam la revenon prirevi***
***Al iu ravonta estonteco.***

***Farita por l'aŭtunan spiri aeron malvarmetan,***
***Projektojn duope aranĝadi,***
***Kontraŭ si amulon brakumi frostotremantan,***
***Ĉe la forno kartludadi.***



***Vivo estas merdo, ĝi estu malbenita !***
***Benita tiu, kiu***
***Ĝin en la nebul' vivi povas***
***De iu amo, kiu ĝin prilumas.***

## Poemo de Lenke Szász, el Rumanio

### Senproteste

**Rapida vagonaro estas la vivo,**
**Rapide nin portas al lasta stacio.**
**Rigardu tra la fenestro la pejzaĝon,**
**Plene ĝuu kun gekaraj la vojaĝon -**
**luj pli frue ol vi devis eliri...**
**Senproteste, do, ĉe via lasta staci'**
**Elpaŝu ankaŭ vi.**

## Poemo de Maria Nazaré Laroca, el Brazilo

### Figuro

**Eble mi estas**
**la reverso de la bildo,**
**kiun kaptas via okulo:**
**metaforo ...**
**aŭ metonimio**
**pri mi: ribelema**
**ĉe l' rando poezia**
**de l' neesprimeblo.**

## Varmego kaj Aŭtado

verkis Petik Janos, el Hungario

Karaj samlistanoj!

La kuranta somero (almenaŭ en Eŭropo) refoje estos memorinda pro sia nekutime alta temperaturo, elprobanta nian elport-kapablon : en mia loĝloko, tagmeze la termometro preskaŭ konstante montras varmegon de proks. 35 gradoj C-aj. Inter ni verŝajne estas tiaj, kiuj pri ĝi ĝojas, dum al aliaj ĝi kaŭzas malagrablaĵon, eĉ suferon.

Verŝajne ekzistas ankaŭ tiaj, al kiuj (simile al mi) la klimatŝanĝiĝo (sub kies titolvorto oni klasas ankaŭ la nunan varmegon) kaŭzas profundajn meditadojn kaj seriozajn zorgojn. Kaj ne senkaŭze: fidindan, certan klarigon pri la kaŭzo de tiaj ŝanĝiĝoj ni ne ricevas eĉ de la plej respektataj kompetentuloj, almenaŭ provizore. Ni vivas inter duboj kaj timoj, nin deprimas streso sub la Damokla glavo de la minaco per apokalipsaj katastrofoj naturaj. Ni povas nur esperi pri la alveno de optimisma, trankviliga klarigo

Nian specion, bonŝance, karakterizas ankaŭ la netolero de streso, la klopodo trovi kaj venki la stresaganton, ĉi-kaze la trovarmiĝon de nia planedon. Ekzistas hipotezoj, laŭ kiuj temas pri prognozebla, do atendebla, sekve iom trankviliga aperaĵo geologia, kiu onidire cikle ripetiĝas tra multaj dekmiloj da jaroj.

Aliaj hipotezoj la varmiĝon imputas al la bruligo de fosiliaj energiportantaj substancoj, kiel nafto, tergaso k.s., kiu kune kun karbondioksido, kiel industria kaj trafika kromproduktaĵo onidire povas kaŭzi la varmiĝon. Kaj ĉi tiaj hipotezoj servas ankaŭ kiel referencaj bazoj por la internaciaj traktadoj pri medioprotektado, de tempo al tempo jam regule okazantaj. Jen io, kio kaŭzas alm. la fortiĝon de niaj esperoj.



Mi, kvankam "laika" pri ĉi tiaj demandoj, estas tamen zorgigita de io ĉi-rilate : en la rezolucioj pri la menciitaj traktadoj legeblas unuavice avertoj pri la faktoro de $CO_2$, dum pri la motoraj veturiloj, uzataj en pli kaj pli granda kvanto, apenaŭ troveblas eĉ mencio. Laŭ iuj kalkuloj ilia kvanto baldaŭ atingos la nombron de 2 miliardoj (la 2-oblon de la 9-a potenco de 10). Ni lernis en la lernejo, ke per la bruligo de unu kg da benzino liberiĝas proks. 46 MJ da varmenergio. Per ĉi tiom da varmenergio la temperaturo de la atmosfero altiĝas je proks. 40 mil gradoj. Kaj ni konsideru, ke aŭtomobilojn la homaro uzadas jam de proks. 100 jaroj.

Mi finas per demando al uzantoj de automobiloj: ĉu vi, antaŭ ol eksidi post la stirilon de via aŭtomobilo, estas konscia pri la efikoj de via aŭtado sur nia (komuna!) medio natura?



## Norvega Nokto



*(La verkintino estas famkonata pupteatra aktorino, tiam laboranta en Zagrebo. Ŝi rakontas personan travivaĵon: dum tuta jaro ŝi senpage helpis amatoran trupteamon, akompanis ĝin al Tromsö okaze de PIF (Internacia Pupfestivalo), kaj miregis ke post la granda sukceso de la teamo, la Kamarado Direktoro proponis al ŝi tranokti la lastan nokton nur en fotelo, kvankam la aliaj ricevis taŭgan liton. Ŝi decidas piediri tra la urbo la tutan nokton).*



Promenante inter tiuj vilaoj, subite mi eksentis, ke iu rigardas min. Ĉirkaŭrigardante mi neniun rimarkis. Eble mi fantazias, mi supozis, ja mi estas jam sufiĉe laca post nokta promenado. Sed mi forte sentis rigardon de iu. Kiam pli atente mi ĉirkaŭrigardis, mi ekvidis knabineton sidantan ĉe unuaetaĝa fermita fenestro. Atente, senmove ŝi rigardis al mi. La tuta estaĵo elradiis solecon. Ŝi estis en blanka noktoĉemizo. Kiel ŝi sidis kuntiriĝinte, ŝiaj piedoj ne estis videblaj. Ŝia kaŭranta figuro aspektis kiel statueto de la tristeco. Kiam mi rimarkis ŝin, mi alproksimiĝis kaj ekridetis, sed ŝi ne reridetis, nur ege serioze rigardis min. Kaj tiam naskiĝis en mi ideo: por unupersona publiko mi prezentos pantomiman spektaklon! Unue mi ŝerce salutis ŝin, kiel la klaŭnoj en la cirko. Ŝi ne ekmoviĝis, sed kun intereso kaj atendado rigardis al mi. Kaj la spektaklo komenciĝis. Mi kuradis kaj saltadis, mi pilkludis kaj dancis. Ŝi rigardis al mi kun pli kaj pli granda interesiĝo. Poste mi kolektis florojn kaj ĉiun aparte flaris, post kio mi etendis la manon kaj proponis la grandan florbukedon al ŝi. Tiam ŝi ekridetis! Ŝi komprenis, ke mia mano, malgraŭ malplenaspekta, donacas al ŝi belegajn florojn! Ŝi ekstaris en la fenestro kaj nun kun feliĉa mieno rigardis al mi. Kaj la spektaklo daŭris. Mi birde flugis, urse paŝis, simie transkapiĝis, violone kaj piane ludis, manĝis kaj trinkis, poste ripozis. Ĉe la fino mi kliniĝis, kvazaŭ mi aŭdus aplaŭdojn kaj kisante mian manplaton, mi blovsendis al ŝi adiaŭan kiseton. Antaŭ mia foriro mi mansignis kaj ridetante ankaŭ ŝi mansignis al mi.

La tiama knabineto nun jam estas 25-26-jara fraŭlino, aŭ jam estas sinjorino kaj eble havas infanojn, al kiuj ŝi ĉiam rakontas sian solecan noktan travivaĵon el la infanaĝo. Sed ŝi neniam ekscios, ke eĉ nun, post 20 jaroj, mi sentas, ke tiu mansigno ŝia estis la plej granda sukceso en mia tuta vivo.

kun permeso de **Júlia SIGMOND**
eltirita el la novelo MI NE ESTAS MONA LISA (2001)

Fonto: **le monde de l'ESPERANTO** no 598 (marto 2017) paĝo 18

## Antaŭ 600 milionoj da jaroj, la unuaj organismoj gigantaj koloniis la Teron

Mistera faŭno de la Ediakario[1]! La paleologoj nuntempe studantaj iliajn fosiliojn, eĉ ne scias, pri pluraj el ili, ĉu ili estas bestoj aŭ plantoj! Ĉiuj kiujn oni konas estas ke multaj maraj organismoj loĝis sur la Tero inter antaŭ 635 kaj 541 milionoj da jaroj. Iliaj nomoj referencas al montetoj Aŭstraliaj de Ediacara (Ediakaro) kie oni trovis fosiliojn el tiu epoko. Nu, la morfologio de tiuj organismoj tute malsimilas al la antaŭaj vivaĵoj kaj ili malaperis sen sekvanto en la evoluoarbo, tial ili estas tre malbone konataj. Jennifer Hoyal Cuthill el la universitato de Kambridĝo estas fakulo. Ŝi studas tiujn organismojn de pluraj jaroj kaj nun publikigas siajn rezultojn en la revuo Nature Ecology and Evolution.

Dum la Ediakario, la plejmulto de la vivantaj specioj ne estis pli grandaj ol kelkajn centimetrojn kaj ofte estis mikroskopaj. Tamen, almenaŭ unu grupo nomita Rangeomorfojn[2], tute esceptas regulon kaj certaj el la specioj grandis ĝis 2 metrojn. Ili vivis en oceano kaj ilia aspekto ekstera pli pensigis pri filikoj kun multaj flankaj branĉoj. Kvankam ili similis al plantoj, la sciencistoj ordigas ilin inter la animaloj.

Hipotezo: drasta kaj neatendita ŝanĝo en la oceana kemio povintus igi rapidan ŝanĝon en la formo de la Rangeomofoj. Tiu ŝanĝo okazis al fino de la glaciepoko nomita Gaskiers : kiam la tero varmiĝis, la oceanoj ricevis multe da nutraĵetoj kaj oksigeno. La rangeomorfoj reagis kreskante sendube ĉar iliaj genoj ilin ebligis. Aliaj organismoj, fenotipe malpli elastaj ne kreskis kaj eĉ malprosperis pro tiuj troaj nutraĵoj.

Formorto: kvankam la Rangeomorfoj bone adaptiĝis al

sia medio dum la Ediakario, ili ne pluvivis post la oceanaj ŝanĝoj okazintaj antaŭ 541 milionoj da jaroj, kiuj aliflanke okazigis la kambrian esplodon, tiun mirindan kreskegon de la biodiverseco. De tiuj novaj specioj naskiĝis la nunaj ĉefaj filumaj grupoj.

**Aŭtoro: Anthony Lucas**

----------

[1] “Ediacarien” ne eksitas esperante en vortaro.net nek en reta-vortaro, nek en Vikipedio. ISAE, samkiel por kriogenio aŭ aliaj ekzemploj troveblaj proponas Ediakario. La vorteto devenas el la monteto australia Ediacara.

[2] -morf/ Suf., uzata por formi nomojn de kelkaj filumoj, klasoj, ordoj aŭ subordoj: cefalaspidomorfoj, pterapsidomorfoj (PIV). ISAE proponas Rangeomorfoj

Fonto: **https://aktuale.scienca-revuo.info/2017/08/04/antau-600-milionoj-da-jaroj-la-unuaj-organismoj-gigantaj-koloniis-la-teron/**

## Kial ni havas anserhaŭton? — Mehmet Fatih Yüce, el Turkujo

Kiam ni promenas en malvarma vetero aŭ kiam io timigas nin - eĉ tiam, kiam ni pensas pri io, kio estas timiga - niaj korpaj haroj altiĝas kaj nia haŭto similas al deŝirita haŭto de ansero. La mekanismo malantaŭ tiuj ŝanĝoj estas bone konata; tiam, kiam oni trovas sin en streĉa situacio la surrena glando komencas sekrecii specifan hormonon - nomata adrenalino -, kiu kaŭzas la



kuntiron de etaj muskoloj ĵus malsupre de la haŭto kaj ekperas altiĝoj en la fundo de haŭtaj haroj. Tiuj ŝanĝoj estas partoj de seriaj reagoj de la korpo nomata “lukto aŭ flugo”. Aliaj reagoj de la korpo estas la altiĝo de la sango premo kaj pliiĝo de sukero, pliiĝita koro bato, malakcelo de agadoj en la digestosistemo ktp.

Por la aliaj anoj de mamuloj, krom homoj, advantaĝoj akiri anserhaŭton ĉe streĉaj stuacioj aŭ malvarmaj veteroj estas klaraj: altiĝita hararo kaptas varmecon en malvarma vetero kaj ŝajnigas la beston pli granda en danĝeraj okazoj, do la besto povas senti pli varma aŭ timigi sian malamikon. Por homoj, funkcioj de aliaj “lukto aŭ flugo” reagoj estas kompreneblaj. Ekzemple; alta sango sukero nivelo faciligas muskolojn akiri sukeron el la sango kaj uzi ĝin por produkti energion (oni bezonas pli bone funkciantajn muskulojn se oni devas batali aŭ forkuri). Simile ĵu pli la koro batas despli la muskoloj ricevas sangon. Sed se ni pensas pri havi la kapablon altigi niajn korpan hararon, tiu ne havas signifon por ni; ni ne havas riĉan korpan hararon kiel bestoj, ni perdis la plejparton de ĝi, kiun ni heredis el niaj praavoj. Do, altiĝanta korpa hararo nek povas kapti varman aeron nek faras nin ŝajni pli granda.



Do, kio estas la avantaĝo havi ĉi tiun lertecon? La respondo al tiu demando estas: “Preskaŭ nenio”. Sed post ĉi tiu respondo alia demando sekvas la unuan: “Kial do ni havas anserhaŭton?”

La respondon oni povas trovi rigardardante la mekanismon de evolucio. Foje evolucio ŝanĝas la vivantajn kreitaĵojn (en tre longa tempo kompreneble) sed lasas la ekziston de kelkaj mekanismoj ene de ili. Tiuj ne plu estas uzataj aŭ ne donas avantaĝojn al ili, kiujn ili bezonis antaŭe. Dum la longa aventuro de evolucio ni perdis la plejparton de nia korpa hararo sed ni konservis la heredan kapablon altigi la korpan hararon kaj krutigi niaj haŭton.

## Esperanto en francaj lernejoj - frontartikolo en "le monde de l'Esperanto"

Esperanto en lernejoj en Francio: eblas! Kaj tio ekzistas jam nun en pluraj lernejoj, kiel vi povos konstati en nia dosiero. Kadre de la reformo pri lernejaj ritmoj la franca ministerio pri nacia edukado proponis, ke oni aparte aranĝu sistemon de lernejaj kromaktivaĵoj por la lernantoj. Tiel por la elementaj lernejoj estas liberigitaj tri horoj semajne por la koncernaj aktivaĵoj. La organizado de tiuj tempoj por lernejaj kromaktivaĵoj (TAP) dependas de la municipoj.

Tute ne temas pri tio, ke oni faru veran kurson al la infanoj, sed ke ili malkovru en luda maniero la lingvon, ke ili havu plezuron ĝin lerni, kaj ke ili restu kun agrablaj memoraĵoj pri Esperanto. La aliroj estas diversaj, kaj tie ĉi oni rakontas pri nur kelkaj el la aktivaĵoj kadre de TAP, en iuj el la lernejoj kie danke al la strebo de Esperanto-parolantoj la lingvo sukcesis eniri per ne-rekta vojo. Kial vi ne provu la samon? La ebloj estas multnombraj.



**Claude Nourmont, ĉefredaktoro**

Fonto: **https://goo.gl/Hzs9Hu**

**"Ne plu atombombitoj!"**

Ĉi tiuj vortoj esprimas la elkoran deziron de la atombombitoj, ke neniu en la mondo spertu la teruran katastrofon kaŭze de nukleaj armiloj por eterne en estonteco. En ĉi tiu somero la deziro movis multajn landojn de la mondo kaj kreis unu traktaton.

La "Traktato pri Malpermeso de Nukleaj Armiloj", kiu malpermesas ne nur uzon sed ankaŭ posedon kaj dislokadon de nukleaj armiloj, estis akceptita kun la aprobo de 122 landoj, kiuj superas 60 procentojn de la membroŝtatoj de la Unuiĝintaj Nacioj. Tio estis la momento, kiam multjaraj klopodoj de la atombombitoj finfine konkretiĝis.

Ni volas nomi ĉi tiun traktaton, kiu menciis suferojn kaj penadojn de la atombombitoj, "la Traktato de Hiroŝimo kaj Nagasako". Kaj ni profunde dankas tiujn landojn, kiuj progresigas la Traktaton pri Malpermeso de Nukleaj Armiloj, la Unuiĝintajn Naciojn, NRO-ojn kaj aliajn, kiuj montras fortan volon kaj kuraĝan agon por forigi el la mondo ĉiujn formojn, kiuj kontraŭas la humanecon.

Sed ĉi tio ne estas la fina celo. Ankoraŭ nun en la mondo troviĝas ĉirkaŭ 15 000 nukleaj armiloj. La internacia situacio ĉirkaŭ nukleaj armiloj fariĝas pli kaj pli streĉita. Disvastiĝas forta maltrankvilo, ĉu nukleaj armiloj estos uzataj en nemalproksima estonteco. Krom tio la nuklearmitaj ŝtatoj kontraŭstaras ĉi tiun traktaton. Ni ankoraŭ ne vidas la vojon, per kiu ni celas atingi la mondon sen nukleaj armiloj. Nun la homaro estas pridemandita, kiamaniere ni ekspluatos la traktaton ĵus kreitan kaj antaŭenigos ĝin.

Ni alvokas la nuklearmitajn ŝtatojn kaj la ŝtatojn sub ilia nuklea ombrelo.

La nuklea minaco ne malaperos tiel longe kiel ŝtatoj daŭre pretendos, ke nukleaj armiloj estas necesaj por ilia sekureco. Volu rekonsideri vian politikon defendi vian landon per nukleaj armiloj. La Traktato pri Nemultigo de Nukleaj Armiloj (NPT) donas al ĉiuj membroŝtatoj devon de nuklea malarmado. Volu plenumi la devon. La mondo atendas vian kuraĝan decidon.

Ni alvokas la japanan registaron.



Malgraŭ la deklaro, ke vi prenos gvidan rolon cele al la mondo sen nukleaj armiloj kaj agos kiel ponto inter la nuklearmitaj ŝtatoj kaj la nenuklearmitaj ŝtatoj, vi ne partoprenis eĉ en la konferencoj traktantaj la Traktaton pri Malpermeso de Nukleaj Armiloj. Tia sinteno tute ne estas komprenebla al la loĝantoj de la atombombitaj urboj. Volu celi fruan partoprenon en la Traktato pri Malpermeso de Nukleaj Armiloj kaj progresigi rekonsideron de la politiko dependi de la nuklea ombrelo. La internacia socio atendas la partoprenon de Japanio.

Krome ni petas la japanan registaron eldiri al la mondo la pacan ideon de la japana konstitucio, kiu firme decidis neniam ripeti militon, kaj la severan observadon al la Tri Ne-nukleaj Principoj. Ni petas vin ĝuste nun ekzameni la planon "Zono sen Nukleaj Armiloj en Nordorienta Azio" kiel konkretan rimedon por progresi al la mondo sen nukleaj armiloj.

Ni neniam forgesas la fakton, ke, la 9an de aŭgusto 1945, antaŭtagmeze je la 11a horo kaj 2 minutoj, super ĉi tiu monteto, kie nun ni kunvenas, la atombombo eksplodis kaj mortigis aŭ vundis 150 000 homojn.

Tiun tagon la atombombo, per siaj teruraj varmoradioj kaj eksploda blovego, ŝanĝis la urbon Nagasako en plene forbruligitan kamparon. Homoj kun pendantaj haŭtpecoj vagis tie, serĉante la familianojn. Patrino staris konsternite apud la karbigita infano. Oni vidis inferajn scenojn ĉie en la urbo. Multaj mortis sen taŭga kuracado. Kaj eĉ nun, 72 jarojn poste, la damaĝoj de radioj daŭre difektas la korpojn de la atombombitoj. La atombombo ne nur forrabis sendistinge la vivojn de karaj familianoj kaj amikoj, kiuj ĉiam vivis proksime, sed ankaŭ kruele ŝanĝis la postajn vivojn de la supervivintoj.

Gvidantoj de ĉiuj landoj de la mondo, bonvolu viziti la atombombitajn urbojn. Volu vidi, kio okazis surtere sub la atomnubo, ne de alta vidpunkto super ĝi. Rigardu per viaj propraj okuloj, aŭskultu per viaj propraj oreloj kaj sentu per via propra animo, kiel la atombombo kruele distretis la dignon de la homoj. Provu pensi, kio okazus, se viaj familianoj estus tie.

Kiam homo havis tro malfacilan kaj maldolĉan sperton, tiu sigelfermas la memoron kaj ne volas

rakonti pri ĝi. Ĉar por rakonti oni devas rememori. Malgraŭ tio la atombombitoj daŭre rakontas sian sperton, tolerante dolorojn en siaj koro kaj korpo, ĉar ili decidis, kiel unuopaj membroj de la homaro, transdoni ĝin por gardi nian estontecon.

Ni alvokas ĉiujn homojn de la mondo. La plej teruraj aferoj estas indiferenteco kaj forgesemo. Ni daŭrigu transdoni la bastoneton de la paco, kiun donis al ni la militospertintoj kaj la atombombitoj, senrompe al estontaj generacioj.

Nun en Nagasako okazas la ĝenerala kunveno de la Urbestroj por Paco. En ĉi tiu reto de 7400 municipoj de la mondo partoprenas ankaŭ multaj reprezentantoj de tiuj urboj, kiuj havas dolorajn memorojn de milito aŭ civila konflikto. Kiel la atombombitoj montris al ni, tiel same kune kun la kolegoj de la Urbestroj por Paco, ni eldiras el ĉi tie Nagasako al la mondo, ke malgrandaj deziroj al urba paco, kun persistaj kunlaboro kaj malrezignemo, povas fariĝi forto movi la mondon. Kaj ni prezentas, ke la vortoj "Nagasako estu la lasta atombombita urbo", kiujn la atombombitoj ripetis ĝis raŭkiĝo, estas la komunaj deziro kaj volo de la tuta homaro.

La meza aĝo de la atombombitoj superis 81 jarojn. Proksimiĝas la fino de la "epoko, en kiu la atombombitoj estas kun ni". Ni petas la japanan registaron pli kompletigi zorgadon al la atombombitoj kaj helpi al la spertintoj de la atombombo.

Ses jaroj pasis de la akcidento de la atomcentralo en Fukuŝimo. Nagasako, kiel la urbo spertinta minacon de radioaktivado, staras apud la damaĝitoj de Fukuŝimo kaj subtenas ilin.

Esprimante nian elkoran kondolencon pri la mortintoj pro la atombomboj, ni, la civitanoj de Nagasako, deklaras, ke kunlabore kun la monda popolo deziranta la mondon sen nukleaj armiloj, ni strebados al elradikigo de la nukleaj armiloj kaj al realigo de la eterna paco.

**TAUE Tomihisa**
Urbestro de Nagasako
la 9a de aŭgusto 2017

**[esperantigita el la japana fare de Vastalto]**
[ 長崎平和宣言 2017 (.pdf / en la japana) / Nagasaki Peace Declaration 2017 (.pdf / en la angla)]

## Enric Baltasar nova prezidanto de TEJO

**Malfrue merkrede vespere la komitato de TEJO elektis novan estraron de la asocio por la venonta jaro. Kiel prezidanto estis elektita Enric Baltasar, kies oficiala nomo estas Pau Codina.**

La elekta komisiono de TEJO rekomendis, ke la komitato elektu naŭmembran estraron, por eviti ke malmultaj estraranoj havu tro da taskoj. Laŭ la elekta komisiono en la lasta estraro la estraranoj estis "superŝarĝitaj". La komitato de TEJO ja grandigis la estraron iom, sed ne tiom – la nova estraro havas sep anojn, du pli ol la antaŭa.

Kiel prezidanton la elekta komisiono rekomendis **Enric Baltasar** el Hispanio, la antaŭan estraranon pri merkatiko, kunlaborado pri informado kun UEA kaj landa agado. Tiun rekomendon la komitato sekvis. Por la posteno de kasisto la komitato, same laŭ la rekomendo de la elekta komisiono, elektis **Bui Mung** el Vjetnamio. Al la posteno de ĝenerala sekretario ne estis elektita **Carlos Pesquera**, kiel rekomendis la elekta komisiono, sed **Hoan Tran (Ĝojo)** el Vjetnamio. Pesquera kaj la antaŭa ĝenerala sekretario Arina Osipova, kiun la elekta komisiono rekomendis por la posteno de estrarano pri kongresoj, tute ne estis elektitaj. Kiel unua vicprezidanto estis elektita **Konstanze Schönfeld (Tuŝka)** el Germanio. Ŝin la elekta komisiono rekomendis kiel estraranon pri subvencioj. Kiel dua vicprezidanto estis elektita **Francesco Maurelli**. Li laŭ la dokumentoj de la elekta komisiono loĝas en Germanio kaj estis rekomendita por la posteno de estrarano kun respondeco pri eksteraj rilatoj kaj rilatoj kun UEA. Kiel ordinaraj estraranoj estis elektitaj **Charlotte Scherping Larsson** el Germanio kaj **Doniben Jimenez Jaramillo** el Kolombio.

Kvar el la sep novaj estraranoj de TEJO ĉeestis en la IJK en Aneho. Neniu afrikano kandidatis al la estraro, kiu estis elektita dum la unua afrika IJK.

Fonto: **http://www.liberafolio.org/2017/08/10/enric-baltasar-nova-prezidanto-de-tejo/**

## Esperanto Kurso (20)




**Tekrar merhaba,**

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir sey oldugunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayrıştırabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

### LA BALENO

En la domo de Sinjoro Muso estas ban-ĉambro, kun akvo kaj varma kaj malvarma. En la ban-ĉambro estas du ban-kuvoj: - granda ban-kuvo por la gepatroj, kaj malgranda ban-kuvo por la infanoj.

Ĉi tiu familio de musoj sin banas ĉiu-tage! Ili tre ŝatas esti puraj.

En la banĉambro estas ankaŭ spongo, viŝtukoj, sapo, kaj kvin dent-brosoj. La musoj brosas siajn dentojn du-foje ĉiutage - matene kaj verpsere.

Johano ofte forgesas brosi siajn dentojn, se li neniam forgesas sin bani.

La ban-kuvo de la gepatroj estas tiel granda, kaj Johano estas tiel malgranda, ke li povas naĝi en ĝi. Li multe ŝatas naĝi!

* * * *

Iun tagon Johano havis malbonan kataron. La akvo elkuris el liaj okuloj. Li ternis - htŝu! htŝu! htŝu! Li tusis - ĥku! ĥku! ĥku!

"Johano devos ne iri al la lernejo hodiaŭ," diris lia patrino. "Li havas malbonan kataron. Li devos resti en la domo. Li devos preni medikamenton."

Do Johano estis ĝoja. Li povos ludi dum la tuta tago!

Je la naŭa, Roĝero kaj Ŝila for-iris al la lernejo, portante siajn librojn kaj krajonojn; sed Johano restis hejme.

"Nu, Johano," diris lia patrino, "mi devas iri al la butikoj, por aĉeti grenon kaj sukeron. Estas neniom da sukero en la domo, kaj via patro ne volas trinki teon sen sukero. Vi restu hejme, ĝis mi re-venos[1]. Ne eliru! Estas tre malvarme ekstere. Vi promesos al mi, ke vi ne eliros?"

Johano promesis, ke li ne eliros, ĝis la patrino revenos.

Tiam Sinjorino Muso metis la fajr-ŝirm-il-on antaŭ la fajron, kaj donis al sia filo grandan dozon da aspirino.

Tiam ŝi surmetis sian ŝalon kaj kufon, prenis sian ombrelon kaj korbon, kaj foriris.

Johano sid-iĝ-is antaŭ la fajro, kaj demandis al si: "Nu, kion mi faru?"

Li pensis momente, "Mi scias," kriis li, "mi ludos per miaj ŝipoj."

La infanoj havas du ŝipojn kaj unu boaton. Johano portis ilin en la banĉambron, kaj tiam li plen-ig-is la grandan bankuvon je akvo malvarma.


Li metis la spongon en la bankuvon. "Tio estas ŝtonego," diris li.

Li metis la kvin dentobrosojn en la bankuvon, dirante: "Tiuj estas fiŝoj."

Li metis viŝ-tukon en la bankuvon, dirante: "Tio estus sablo."

Li metis la rubandon de Ŝila en la bankuvon dirante: "Tio estas algo."

La ŝtonego, la algo, la fiŝoj kaj la sablo, ĉiuj falis ĝis la fundo de la akvo, sed la ŝipoj kaj boato flotis ĉe la supr-aĵ-o de la akvo.




"Ho," diris Johano al si "se nur estus baleno!"
Li pensis momente. Tiam li diris, ĝoje: "Mi estos baleno!"
Li sen-vest-ig-is sin, kaj en-iris en la akvon.
"Ho, ho," kriis li, "nun mi estas granda baleno!"
Li movis sian voston de flanko al flanko en la bankuvo.
Baldaŭ la du ŝipoj kaj la boato estis ĉe la fundo de la akvo.
"Ŝip-pereo! Ŝip-pereo!" ekkriis Johano, ridante laŭte. "Nun mi estos sav-boato. Mi ne plu estos baleno."
Li flot-ig-is denove la ŝipojn kaj la boato. Tiam li iĝ-is baleno denove...

* * * *

Unu horon poste, Sinjorino Muso revenis de la butikoj, alportante la grenon kaj la sukeron en sia korbo.
Kion ŝi trovis?
Ŝi trovis Johanon, kiu jam havis malbonan kataron, malseka, malvarma, tremanta!
"Ho, Johano," ekkriis ŝi, "Kion vi faris?"
La kompatinda Johano tiel tremis, ke li apenaŭ povis paroli. "M-m-m-mi est-t-t-tis b-b-bal-l-l-eno k-k-kaj s-s-sav-b-b-boat-t-t-to," balbutis li.
"Ho, Johano!" Vi malbona museto, iru al la lito tuj!" kriis la kolera patrino. Tiam, sin turninte al sia edzo, ŝi diris al li, "Ven-igu-u la kuraciston. Diru al li, ke li venu tuj."

-----

[1]re-venos= venos denove.

| **Sözlük** | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| | | aspirino | aspirin | broso | fırça |
| aĉeti | satın almak | balbuti | kekelemek | butiko | dükkan, butik |
| algo | yosun | baleno | balina | dentbroso | diş fırçası |
| alportante | taşıyarak | bankuvo | küvet | dozo | doz |
| antaŭ | önce | boato | tekne, sandal | ekstere | dışarda |
| apenaŭ | hemen hiç | brosi | fırçalamak | eliri | çıkmak |

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| elkuri | dışarı koşmak | | bir anlığına | | elbiselerini çıkarmak |
| fajrŝirmilo | ateş koruyucusu | momento | dakika | sidiĝi | oturmak |
| | (şömine önüne konan ince | naĝi | yüzmek | ŝipo | gemi |
| | telden ateşin sıçaramasını | perei | yok olmak | ŝip-pereo | gemi kazası |
| | engelleyen koruyucu) | plenigi | doldurmak (bir şeyi) | ŝirmi | korumak |
| fiŝo | balık | portante | taşıyarak | ŝirmilo | kuruyucu/sundurma |
| floti | yüzmek | promesi | söz vermek | spongo | sünger |
| flotigi | yüzdürmak | pura | temiz | ŝtonego | büyük taş |
| foriri | uzaklaşmak, gitmek | reveni | dönmek, geri gelmek | ŝtono | taş |
| fundo | dip | rubando | kurdele | supra | yukarıdaki |
| greno | tahıl | sablo | kum | supraĵo | yukarı kısım |
| igi | oldurmak (başkasını) | sapo | sabun | tremanta | titreyen |
| iĝi | olmak (kendisi) | sav-boato | kurtarma teknesi/ | tremi | titremek |
| kataro | nezle | | kurtarma sandalı | tusi | öksürmek |
| medikamento | ilaç | senvestigi | soymak (bir şeyi) | viŝtuko | havlu (kelimesel |
| momente | bir dakikalığına/ | senvestigi sin | kendisini soymak, | | anlamı: silme-bezi) |

**Dilbilgisi**

| | |
|---|---|
| re- | tekrar, geri anlamında ön ek (ör. re-veni, tekrar gelmek, geri gelmek) |
| -ig- | Geçişsiz olan bir fiili geçişli hale getirir (dormi -> dormigi = uyumak > uyutmak) |
| -iĝ- | Geçişli olan bir fiili geçişsiz hale getirir (veki -> vekigi = uyandırmak > uyanmak) |
| -int- -ant- -ont- | bir fiilden aktif ortaç yaratır (trinki -> trinkanta = içmek -> içen/içmekte olan) (isim, sıfat, zarf formlarında olabilir ör: trinkanto, trinkanta, trinkante=içmekte olan kişi, içmekte olan, içerekten) (geçmiş, şimdiki, gelecek zaman formlarında olabilir) |
| -it- -at- -ot- | bir fiilden pasif ortaç yaratır (trinki -> trinkata = içmek -> içilen/içilmekte olan) (isim, sıfat formlarında olabilir, ör: trinkato, trinkata=içilen şey, içilmekte olan şey) (geçmiş, şimdiki, gelecek zaman formlarında olabilir) |

## Ekfunkciis “Fuxing”

**Ekfunkciis “Fuxing”, grandrapida trajno memstare esplorita kaj produktita de Ĉinio**




La 25-an de junio la “familio” de ĉinaj grandrapidaj trajnoj bonvenigis novan membron, kiu estas memstare esplorita kaj produktita de teamo gvidata de la Ĉina Fervoja Kompanio. La novspeca trajno ricevis la nomon “Fuxing” (releviĝo). La 26-an de junio du trajnoj de la nova modelo ekfunkciis respektive de la du finhaltejoj de la linio Pekino-Ŝanhajo: la suda stacidomo de Pekino kaj la stacidomo Hongqiao de Ŝanhajo. La rapido de la trajno en ĝia testado superis 400 kilometrojn hore kaj tiu en reala veturado 350 kilometroj hore.

Redaktoro: **Gao Shuyuan**

Fonto: **http://www.espero.com.cn/2017-06/26/content_41099219.htm**



## La stato de Esperanto en Hungario

En Hungario oni rajtas instrui Esperanton en ĉiuj niveloj de la lerneja sistemo, ankaŭ oficiale en laŭhorara formo, kaj ankaŭ en libertempaj (fakrondaj) formoj. Malgraŭ la jura eblo tiu lerneja instruado estas farata nur en kelkaj lernejoj (1 bazlernejo kaj 3 mezlernejoj).



Oni rajtas elekti ankaŭ Esperanton, kiel abiturientan ekzamenon. Post malgranda kromprocezo ankaŭ tiuj lernantoj rajtas elekti ĝin, kiuj ne studis la lingvon en sia mezlernejo. (Flanka interesa fenomeno: ankaŭ plenkreskuloj havas la rajton fari abiturientan ekzamenon pri Esperanto - sed devas iom krompagi)

Por eniri/akceptiĝi al universitatoj, student-kandidatoj devas superi iun limon de kolektitaj lernejaj poentoj. Ankaŭ por sukcesa lingvo-ekzameno aŭ abiturienta ekzameno pri Esperanto oni ricevas kromajn, plusajn poentojn. Laŭ freŝa legxo, ŝtata ekzameno pri iu lingvo ekde 2016 estos nepra kondiĉo por esti akceptita al universitato.

Por ricevi sian diplomon, studentoj de ĉiuj universitatoj kaj altlernejoj devas havi sukcesan ekzamenon ankaŭ pri iu lingvo. En multaj altlernejoj kaj universitatoj oni akceptas ankaŭ Esperanton (Hungara Akademio pri Sciencoj faris deklaron pri ĝia karaktero de "viva lingvo"), kaj ekde la jaro 2000 okazis ĉiujare ĉ. 5.000 tiaj ekzamenoj. (Tio signifas jare nur ĉ. 2 mil personojn, ĉar multaj devas plurfoje ripeti.) Tiuj homoj lernas la lingvon nur pro la ekzameno, sed ne iĝas esperantistoj.

En la retpaĝo **http://www.eszperanto.hu/erettsegi.htm#korabbivizsgaktetelei** estas troveblaj por libera elŝuto ĉiuj ekzamenaj materialoj de la antaŭaj jaroj. Krom la titolpaĝo ili estas plene E-lingvaj*.

Fonto: **http://www.eszperanto.hu/esperanto-en-hungario.htm**

---

* En la listo (vidu jene) la unua ligilo (1) estas por la malplena ekzamen-papero, la dua (2) estas por la mp3 aŭskultad-dosiero, kaj la tria (3) estas la plena ekzamen -papero. Do estus bona ideo por plibonigi vian lingvo, se vi elŝutos, aŭdos kaj provos fari la ekzamenojn.



Recomm

**A korábbi évek vizsga-tételei**


(1) (2) (3)

- 2005. május - középszint – írásbeli – javítási útmutató – hallás utáni szövegértés
- 2005. november - emelt szint – írásbeli – javítási útmutató – hallás utáni szövegértés
- 2005. november - középszint – írásbeli – javítási útmutató – hallás utáni szövegértés
- 2006. február - emelt szint – írásbeli – javítási útmutató – hallás utáni szövegértés
- 2006. május - emelt szint – írásbeli – javítási útmutató – hallás utáni szövegértés
- 2006. május - középszint – írásbeli – javítási útmutató – hallás utáni szövegértés
- 2006. november - középszint – írásbeli – javítási útmutató – hallás utáni szövegértés

## Estas nokto. Pluvas. Tiktako... Kiel bato de la koro

Goia Albano, el Italujo

Pluvas longe... Sen bruo, sen ke tio konsternas aŭ surprizas. Pluvas akvo sur akvon, nedifinita, senkolora maso, komuna al alia akvo, kiu jam pluvis.
Sed tiu kiu ŝajnas sensignifa, elaĉetas kaŝe kaj sen la scio de la mem pluvo, ĉion, kio neniam povas esti estingita.
Vi fluas guto post guto.
Kaj ankoraŭ pli dense vi verŝiĝu ĉie...
Ne eblas halti vin, vi povas fali senĝene.
Muĝas la tondroj, kiel malsataj roradoj, senesperaj krioj!
Ili malsatas de larmoj, ili petegas la negatan ploron.
Kaj vi falas, pluvo, ne sen bruo kial vi estas la ploro glita sur la vizaĝoj de mondo, kiu ne scias fluigi plu larmojn "Kial fluigi larmojn?"
Pluvo kiu plaŭdas ankaŭ por vizaĝoj jam nun kalkigataj, sen la esprimo plej granda, kiu igas ilin homoj: malgrandec-esprimo! (aŭ ĉu grandec-esprimo?)



Pluvo, vi falas por memorigi al ni - kvankam ni ne havas nenecesajn memorojn - tion, kiun ni ne sciis.
Vi falas ankoraŭ, vi falas ĉiam por gliti sur nia fragila ŝelo el ŝtalo, malantaŭ kiu ni barikadas nin, ni kaŝas nin.
Vane, por viaj mil tuŝoj de atavisma kompato.

Fonto: **https://ilconfinedelleparole.blogspot.com.tr/2012/01/estas-nokto-pluvas-tiktaktio-kiel-bato.html**

## El la afrika kuirarto: Mafeo, legomstufaĵo kun ternuksa butero.

*Hodiaŭ por la unua fojo, almenaŭ konscie, mi faris manĝaĵon el nigra Afriko kaj mi vere ĝojas pro la bonega rezulto! Kvankam oni povus pensi ke ĝi foras kaj malsamas al mia kuirarto, tio tute eraras! Mi venas el Kubo kaj tie afrikanoj kaj eŭropanoj miksis siajn kuirartojn kaj kreis novajn pladojn kaj ni manĝas multajn legomojn origine afrikaj kiuj ne multe popularas en Eŭropo sed ja en granda parto de Ameriko. La nura surprizo aŭ strangaĵo por kubano kiel mi estas uzado de ternukso por salaj manĝaĵoj ĉar ni kutime uzas ĝin por dolĉaĵoj, kun kelkaj esceptoj.*

*Se vi ankoraŭ ne manĝis afrikan pladon, mi pensas ke tiu ĉi estos bona enkonduko por tio ĉar ĝi estas bongustega, facila kaj nemultekosta. Krome, ĝiaj ingrediencoj povas varii multe kio helpos vin kaze ke iu legomo mankus Se vi legas la blogon el Afriko, mi ŝatus scii pri via opinio ĉu mi ĝuste faris aŭ kiel mi povus ĝin plibonigi.*

*Maafeo (maafe, maafé, maffé aŭ mafé) estas simpla stufaĵo origine el Senegalo sed disvastiĝinta en plejparto de tuta okcidenta kaj centra Afriko. Kvankam multaj versioj aldonas viandon, la plej baza formo estas tute vegetaĵa kaj konsistas el ternuksa saŭco kun legomoj kaj tomatoj kirlitaj kaj ĉio boligita. Kutime ĝin akompanas rizo.*

*Mi legis interrete plurajn receptojn kaj spektis kelkajn filmetojn en jutubo kaj fine decidis prepari ĝin samkiel faras la homojn tie. Tamen, per niaj modernaj iloj estos pli rapide farata.*

**Ingrediencoj:**

1 melongeno
3 maturaj tomatoj (Lycopersicon esculentum)
1/2 ruĝa kapsiko
1 aŭ 2 karotoj
3 malgrandaj terpomoj
1/2 cepo
1/4 kulereto da salo
1 manioko
1 manpleno da gomboj
1 ignamo
1 kulero da koncentrita tomato
2 kuleroj da ternuks-butero
2 kuleroj da olivoleo
1 ajlero
1 kvadrateto el koncentrita legomsupo.

**Paŝoj:**

Unue dispecigu la melongenon, senŝeligu la terpomojn, la maniokon, ignamon kaj tranĉu la gombojn.



Kirlu la tomatojn, aldonu al la kirlaĵo la kulerojn da ternuks-butero, la olivoleon kaj du tasojn da akvo kaj ĉion metu en kaserolon mezfajre kaj movu bone.

Aldonu al ĝi la dispecigitajn legomojn kaj lasu boli, ŝtopu la kaserolon kaj de tempo al tempo movu ĝin bone.

Nun venis la tempo por kirli la kapsikon kun la ajlero kaj la duoncepo kaj aldonu al ĝi kun la koncentrita tomato kaj kun koncentrita legomsupo. Laŭplaĉe aldonu la salon kaj la sukeron kaj lasu je malalta fajro dum kelkaj pliaj sekundoj.

(Kvankam mi aldonis plurajn afrikajn legomojn, vi povas uzi malpli ĉar mi scias ke ne ĉiam facilas trovi ilin. Mi mem ne uzis ignamon)

***Kutime oni manĝas ĝin kun rizo. Servu unue la rizo kaj sur ĝi la mafeo!***

**Bonan apetiton!**

Fonto: **http://veganarto.net/el-la-afrika-kuirarto-mafeo-legomstufajo-kun-ternuksa-butero/**

VeganArto

---

*Solvo de la kruĉvort-enigmo*

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | F | R | E | N | E | Z | U | L | O | | O | K |
| 2 | A | E | R | O | | O | R | A | | S | A | L |
| 3 | N | A | K | | P | N | E | Ŭ | M | O | N | |
| 4 | T | L | A | | R | O | M | | O | N | A | F |
| 5 | A | O | S | T | O | | I | | N | O | M | O |
| 6 | Z | | | A | N | T | O | | A | | | R |
| 7 | I | R | O | N | I | O | | O | T | N | A | K |
| 8 | A | E | R | I | | R | A | F | A | E | L | O |
| 9 | | M | A | N | T | E | L | O | | V | E | |
| 10 | K | A | Ĵ | O | L | I | | S | K | O | L | O |